

LA ONDO de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto

Bertilo Wennergren:
la Esperantisto de la Jaro

Radio Polonia adiaŭas

Zamenhofaj Tagoj
tra la mondo

“Kune ekde 1957”

Pri lingva politiko
en la ĉefurbo de Slovakio


Konsulo Silfer respondas

Ankoraŭfoje pri PMEG

Originala novelo
de Leif Nordenstrom

Literatura konkurso
“Liro-2006”

Fotoraportoj



Januaro
2007

Nº1

LA ONDO de esperanto

INTERNACIA SENDEPENDA MAGAZINO

2007. №1 (147)

Aperas ĉiumonate

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov

Refondita en 1991

Eldonas kaj administras Halina Gorecka

Redaktas Aleksander Korĵenkov

Konstantaj kunlaborantoj Tatjana Auderskaja, István Ertl, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Alen Kris, Glebo Malcev, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Sergio Pokrovskij, Aloisio Sartorato, Serge Sire, Maria Sokolova

Adreso RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Telefono (4012) 656033

Elektronika poŝto sezonoj@kanet.ru

Hejmpaĝo <http://Esperanto.Org/Ondo>

Abontarifo por 2007

Internacia tarifo: 32 eŭroj

Orienteŭropa tarifo: 18 eŭroj

Ruslanda tarifo: 390 rubloj

Pollanda tarifo: 60 zlotoj

Aerpoŝta aldono: 5 eŭroj

Elektronika abono (pdf): 12 eŭroj

Perantoj vidu la liston sur la paĝo 23.

Konto ĉe UEA avko-u

Recenzoj Bonvolu sendi *du* ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k.a. al la redakcia adreso.

Eldonkvanto 750 ekzempleroj

Anonctarifo

Plena paĝo: 100 EUR (2000 rubloj)

Duona paĝo: 60 EUR (1200 rubloj)

Kvarona paĝo: 35 EUR (700 rubloj)

Okona paĝo: 20 EUR (400 rubloj)

Malpligrandaj: 0,50 EUR aŭ 10 rubloj por 1 cm²

Kovrilpaĝa anonco kostas duoble. Triona rabato por ripeto en la sekva numero.

Donacoj La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia konto “avko-u” ĉe UEA.

Represoj Oni povas represi tekstojn kaj bildojn el *La Ondo de Esperanto* nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

© *La Ondo de Esperanto*, 2007.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2007, №1 (147).

Ежемесячный журнал на международном языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ № 77-9723.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р.

Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 26 декабря 2006 г.

Цена свободная. Тираж: 750 экз.

Отпечатано в Польше. Presita en Pollando.

Digne prepariĝi al la Zamenhofa Jubileo 2009

La ĵusa okazintaĵo en la Pola Radio abrupte, skue malordigis la glatan etoson de nia Esperanto-mondeto kiu, malgraŭ la flamaj solenaj UK-paroladoj, plejparte vivas trankvile de unu renkontiĝo al alia, de unu klaĉado al alia (“estas ni esperantistoj”, — eblus diri laŭ la konata satiraĵo de Julio Baghy). Nu, forigante tiun elsendon oni krude, malferme, malĝentile demandis, kial ŝtata radio elspezu publikan monon por afero de “hobiuloj”, kaj oni rekte aludis la judecon de la iniciatinto de Esperanto ne precize per tro ŝata sinteno.

Tiu malagrabla sperto denove vekis nin el nia dolĉa sonĝo. Ne nur temas pri tio, ke nuntempe la mondo verŝajne ignoras eĉ la ekziston mem de Esperanto, dum ĝi pene, mal-ekonomie “solvas” per la tutmonda angla la interlingvan demandon pri kiu ni ĉiam insistis, sed plu fariĝas danĝere potencaj kelkaj fortoj kiuj ideologie kontraŭas nin.

Kaj rapide proksimiĝas la 150a naskiĝdatreveno de Zamenhof. Tiel kiel dum 2005 oni festis la Einstein-jaron, 2009 estu la dua Zamenhof-jaro, ne nur en nia aparta movado/komunumo sed precipe **ekster** ĝi. Ni klopodu, ke Unesko oficiale deklaru tion samkiel antaŭ kvindek jaroj.

Eble pli ol iam, ni ne nur rajtas sed devas sobre (ne hagiografie) tamen fiere elstarigi liajn meritojn kiel idealisto kaj humanisto, genia, energia lanĉinto de praktika iniciato por homaj interkompreniĝo kaj repaciĝo. Tiu etika, idealisma animo estas, kune kun (fakte nedisigeble de) la lingvo mem, nia plej riĉa heredaĵo. Ĉu pravis la tiamaj hon- totimaj gvidantoj de la movado, kiuj antaŭ cent jaroj silentigis lin favore al strikte racia, porkomerca, nurlingva komunikilo? Nu, gravaj intelektuloj, kiel Umberto Eco, esprimis admiron por lia morala kaj klera figuro, sugestante ke indus pli bone konigi la fascinan biografion de Zamenhof, la idean flankon de lia agado. Ĉu ĉi-foje finfine aperos filmo pri li, etnolingvaj tradukoj de liaj biografio kaj vortoj (kiel *Mi estas homo*), specialaj poŝtmarkoj, plurlingva omaĝa retejo, ktp?

La du antaŭaj jubileoj havis sian centran UK-feston en Pollando, ĵus elirante en 1959 el la stalinismaj persekutoj, baldaŭ enirante en 1987 en la orienteŭropan Esperanto-krizon. La decido, kiun la pollanda registaro faris pere de siaj politikaj burokratoj nun potencaj en la radiostacio, decido vere malestima ne nur al nia afero sed aparte al Zamenhof mem kaj al esencaj valoroj tiom karaj al li, devigas nin serioze pripensi: ĉu ni okazigu nian jubilean UK-on tie? Mi scias ke iuj tuj respondos, ke tamen jes, “ni amase venu tien por montri kaj starigi precedencon ke la Esperanto-movado estas forta, multimema, vivkapabla”, ktp. Mi sincere dubas.

Ja estus bele soleni en Bjalistoko. Sed se la “tergloba vilaĝo”, laŭ la konata metafora bildo de McLuhan, eĉ se moderniĝinta, plene merkatigita kaj mirinde teĥnologia, tamen iel similas al la iama Bjalistoko, vilaĝo kun kvereloj inter la popoloj kaj gettoj kie mizere vivas neŝtatataj membroj de la socio (enmigrintoj, malriĉuloj, lingvaj malplimul- toj, ktp) ni rezistu ĉiun ajn pogromon. Reen al la noblaj esperoj de d-ro Esperanto!

José Antonio Vergara

Mi havas multajn projektojn...

Bertilo Wennergren respondas



LOdE: Kiel impresis vin la informo, ke vi iĝis la Esperantisto de la Jaro?

BW: Mi tre ĝojis, kompreneble. Ĉiam estas agrable ricevi rekonon de longa kaj pena laboro.

LOdE: La internacia elektantaro laŭreatigis vin kiel la aŭtoron de PMEG. Sed ja temas nur pri fino de granda laboro, kiu daŭris pli ol unu jaron. Kial vi ekhavis ideon pri ĝi, kaj kiam ĝi estis ekverkita? Dum kiom da tempo vi laboris pri ĝi?

BW: La ideo verki iaspecan gramatiklibron en Esperanto iel ŝvebis en mia kapo jam de kiam aperis mia kompendio de Esperanta gramatiko por Svedoj (*Esperantokompendium*), sed la konkreta instigo al ekagado venis de Jorge Camacho iam en 1991. Kiam samjare ankaŭ Osmo Buller (krie) demandis al mi, kiam mi verkos mian gramatikon (en — aŭ pli ĝuste trans — la libroservo de la UK en Bergeno), mi decidis komenci la laboron. Se mi tiam sciuis, kiom da laboro tio postulos, mi kredeble rezignus pri la tuta projekto, sed mi estis juna kaj malsaĝa... La efektiva verkado daŭris ĝis 1995, kiam mi povis publikigi la tuton en la Interreto. Kiom da horoj mi pasigis antaŭ mia komputilo, mi tamen nun ne povas pritaksi. Sed poste mi ankoraŭ multe poluris, korektis kaj iom kompletigis.

LOdE: Kiom diferencas la unua reta kaj la libroforma teksto?

BW: Nur en kelkaj malmultaj lokoj mi faris vere signifajn ŝanĝojn (ekzemple, pri respondado al neaj demandoj). Sed la multegaj malgrandaj korektoj kaj kompletigoj, kiujn oni rimarkas nur se oni tre zorge komparas, kredeble tamen sume sufiĉe grave diferencigas la unue publikigitan version disde la ĉi-jara libra eldono. Por esti honesta mi devas konfesi, ke la tuto estas tiom kompleksa, ke mi ofte mem perdas la superrigardon. Tial mi fakte ne povas bone respondi tiun demandon.

LOdE: Post Jouko Lindstedt kaj Michel Duc Goninaz vi estas la tria esperantisto de la jaro, ricevinta ĉi tiun titolon pro esperantologia laboro. Ĉi

tio estas honoro, sed ankaŭ respondeco, ĉu ne?

BW: Sendube pezas sur la ŝultroj de farantoj de tiaspecaj verkoj kiel PIV kaj PMEG granda respondeco. Se mi skribas ion eraran en PMEG, kaj se PMEG estos rigardata kiel iaspeca normo, tiam iuj eble mislernos. Mi ĉiam ripetas, ke PMEG ne estas perfekta, kaj ke certe en ĝi estas gravaj eraroj (same kiel en PAG). Legantoj do nepre pensu mem, kaj rigardu PMEG-on kiel fonton de konsiloj. Tia singarda aliro estas konsilinda ankaŭ pri PIV, pri la *Hejma Vortaro* kaj pri aliaj verkoj Esperantologiaj.

LOdE: Sed kiun rolon la Akademio havas?

BW: La Akademio havas gravan rolon. En ĉiuj okazoj, kiam la Akademio de Esperanto faris konkretajn decidojn kaj rekomendojn pri gramatikaj aferoj, mi tiujn instruojn zorge enmetis iaforme en PMEG-on. La Akademio plu laboras, kaj tute povas esti, ke estontaj eldonoj de PMEG estos iudetale ŝanĝitaj pro intertempe aperintaj decidoj Akademiaj.

LOdE: Kiuj gramatikaj problemoj estas la plej sentebraj nuntempe?

BW: Mi multe interesiĝas pri la evoluo de la junulara lingvaĵo. Mi notis kelkajn tendencojn tre interesajn kaj tre diversspecajn. Temas, ekzemple, pri pli libera uzo de rolvortetoj (prepozicioj) antaŭ subfrazoj kaj I-verboj (“Ni parolis pri kiel Esperanto diferencas de naciaj lingvoj”; “Ili diskutis pri eldoni tian gazeton”; “ŝi dankis pro ricevi la donacon”...) — en si mem tute logikaj uzoj, sed ja konfliktantaj kun la tradiciaj normoj; kaj ankaŭ pri aferoj pli ŝokaj kiel ekzemple uzo de “je” por marki objekton aŭ eĉ nova objekta rolvorteto “na” (“Ili admiras je/na Zamenhof”) kaj similaj

☛ pĝ 4

La Esperantisto de la Jaro 2006

La Ondo de Esperanto iniciatis en 1998 ĉiujaran proklamon de la Esperantisto de la Jaro. Al la projekto aliĝis reprezentantoj de diversaj tendencoj en la Esperanto-komunumo kaj sendependaj kompetentuloj.

Kiel la unua laŭreato en 1998 estis elektita William Auld. En 1999 lin sekvis Kep Enderby. En 2000 estis distingitaj tri personoj: Hans Bakker, Mauro La Torre kaj Jouko Lindstedt. Poste laŭreatiĝis Osmo Buller (2001), Michel Duc Goninaz (2002), Dafydd ap Fergus (2003), Helmar Frank (2004), Povilas Jegorovas (2005).

Ĉi-jare estis proponitaj 21 personoj, al kiuj la elektantoj povis doni siajn voĉojn.

La rezulto de la voĉdonado:

Bertilo Wennergren	6 voĉoj
Peter Zilvar	5 voĉoj
Chuck Smith	4 voĉoj
Barbara Pietrzak, Humphrey Tonkin	po 3 voĉoj
Petr Chrdle, István Ertl, Ilona Koutny, Stefan Maul	po 2 voĉoj
Peter Balaž, André Cherpillod, Antonio De Salvo, Bharat Ghimire, Albrecht Kronenberger, Hori Yasuo	po 1 voĉo

Sveda esperantisto Bertilo Wennergren, loĝanta nun en Koreio, estas proklamita la Esperantisto de la Jaro 2006 pro la *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko* (PMEG).

Halina Gorecka
Sekretario

La Esperantisto de la Jaro 2006

Proponantoj

Marija Belošević (HR):

eksekretario de ILEI

Višnja Branković (IT):

direktoro de *Orbis Pictus*

Renato Corsetti (IT):

prezidanto de UEA

Aida Čižikaitė (LT): sekretario de LitEA

István Ertl (LU): tradukisto ĉe Eŭropa

Revizora Kortumo

Edmund Grimley Evans (GB):

prezidanto de EAB

Maritza Gutiérrez Gonzalez (CU):

estrarano de UEA pri landa kaj regiona agado

Judit Felszeghy (HU): eksekretario de

la Esperanta PEN-Centro

Dafydd ab Iago (BE): eksdirektoro de la

Brusela Komunikadcentro de EEU

Aleksander Korĵenkov (RU):

redaktoro de *La Ondo de Esperanto*

Bruno Masala (FR):

komitatano de OSIEK

Valentin Melnikov (RU):

poeto, ĵurnalista, tradukanto

Mine Yositaka (JP):

redakciano de *La Movado*

Barbara Pietrzak (PL): estro de la

Esperanto-redakcio de la Pola Radio

Yamasaki Seikō (JP): membro de la

Akademio de Esperanto

Ziko van Dijk (NL):

historiisto, aŭtoro de *Esperanto sen mitoj*

Elektantoj

Petr Chrdle (CZ):

direktoro de KAVA-PECH

Michel Duc Goninaz (FR):

lingvisto, redaktoro de NPIV

Agneta Emmanuelson (SE):

estrarano de FEM

Gbeglo Koffi (TG): eksdirektoro de la

Afrika Oficejo de UEA

Ilona Koutny (PL): gvidanto de la

Interlingvistikaj Studoj ĉe UAM

Lee Chong-Yeong (KR):

eksprezidanto de UEA

Stano Marček (SK):

redaktoro de *Esperanto*

Geraldo Mattos (BR): prezidanto de la

Akademio de Esperanto

Stefan Maul (DE):

ĉefredaktoro de *Monato*

Atilio Orellana Rojas (NL/AR):

direktoro de IEI, sekretario de ILEI

Sergio Pokrovskij (RU): sciencisto,

tradukanto, eseisto

Anna Margareta Ritamäki (FI):

prezidanto de EAF

Roland Rotsaert (BE): kasisto de IKEF;

redaktoro de *La Merkato*

Josef Shemer (IL): prezidanto de ELI

Ljubomir Trifončovski (BG):

verkisto, redaktoro

Sekretario

Halina Gorecka (RU):

eldonanto de *La Ondo de Esperanto*

novaĵoj/herezaĵoj. Tradicie Esperantologoj atentigas precipe la skriban uzon. Eble ili maltrafas gravajn fenomenojn aperantajn precipe en parola uzo (sed nun tamen observeblajn ankaŭ en la Interreta paroleca skribado retroŝta k.s.).

LOdE: Ĉu via esperantista agado malhelpas al via profesia laboro aŭ vi utiligas profesie Esperanton?

BW: Mia nuna profesio naskiĝis rekte el mia laboro pri PMEG. Ĝuste la Reta publikigo de PMEG kaj la posta laboro por flegi kaj evoluigi la Retan PMEG-on kaŭzis, ke mi eklernis kaj plulernis pri programado kaj kreado de TTT-paĝoj. Tial finfine mi povis eklabori ankaŭ profesie tiukampe. Ĝuste nun miaj monenspezoj venas de mia engaĝiĝo en la TTT-ejo "Lernu!" [<http://lernu.net>], kie mi plenumas precipe programadajn taskojn.



LOdE: Oni konas vin ne nur kiel la aŭtoron de PMEG kaj kiel influhavan akademianon, sed ankaŭ kiel pioniron de la moderna Esperanto-muziko. Kial vi lastatempe malpli aktivis en ĉi tiu sfero?

BW: La nunan malaktivadon de la bando *Persone* (kiu principe plu ekzistas) kaŭzas simple tio, ke la tri bandanoj nun loĝas tro dise por povi kunludi (en Svedujo, Germanujo kaj Koreujo). Bonŝance tamen Martin (nia ĉefkantisto kaj gitaristo) ĵus registris propran diskon (baldaŭ eldonotan), kiu iele daŭrigas la laboron de *Persone*. Mi kontribuis per kuraĝigado kaj iom da konsiletoj. Mi certas, ke iam iel *Persone* denove koncertos, sed kredeble ne tre ofte, kaj kredeble nur akustike (malroko).

LOdE: Ĉi tiu intervjuo aperos en *La Ondo de Esperanto*. Kiun opinionon vi havas pri ĉi tiu revuo?

BW: Mi havas tre favoran opinionon pri *La Ondo*, precipe pro ĝia multflankeco kaj sentimeco. Mi aparte admiras, ke *La Ondo*, kiu antaŭ nelonge aperigis tre negativan recenzon de PMEG, nun honorigas min kiel Esperantiston de la jaro ĝuste pro tiu sama verko. Tia malfermece al diversaj opinioj estu modele por nia gazetaro.

LOdE: Por kiu(j) vi voĉdonus, se vi estus elektanto ĉi-jare?

BW: Mi ripetas tiun saman nomon, kiun menciis Jouko Lindstedt en 2000: Floréal Martorell, kiu senlace laboras pri eldonado de Esperanta muziko.

LOdE: Ne estas evitebla demando pri viaj planoj.

BW: Mi nun konkrete laboras pri nova eldono de PMEG! Ĝi konsistas el nova Interreta versio kun korektoj de kelkaj eraroj kaj kun kelketaj kompletigoj, kaj el folio kun korektendaĵoj por la unua papera eldono. Mi devas krome menci la Esperantologian TTT-ejon *Lingva Kritiko* [<http://lingvakritiko.com>], kiun mi ĵus lanĉis. Cetere mi havas multajn projektojn Akademiajn, ekzemple, 10a Oficiala Aldono (se sukcesos la baldaŭ privoĉdonota 9a OA). Abundas ankaŭ ideoj por plibonigi kaj pliampleksigi la Tekstaron de Esperanto [<http://bertilow.com/tekstaro/>], k.t.p., k.t.p.

LOdE: Ĉiu laŭreato devas respondi nian tradician demandon: Kiujn tri Esperantajn librojn vi kunprenus, ekzilate al neloĝata insulo (ironie al kosmovojaĝo k.s.)?

BW: Mi ĵus mendis la verkon *Lingvaj babilaĵoj* de Cherpillod. Se la ekzilo okazos tuj post kiam mi ĝin ricevos, mi do nepre ĝin kunportos. Mi tiam nepre kaptu la okazon iom ripozi de la Fundamento, PIV kaj *Lingvo kaj Vivo* (kiujn mi daŭre relegas), kaj anstataŭe finfine legos *Reguluson* de Lorjak. Krome mi kunportos la du papilromanajn de Trevor Steele (ĉar mi ilin ankoraŭ ne legis), esperante, ke oni ne rimarkos, ke la promesitaj tri libroj fariĝis kvar (kaj ke neniu rimarkos la k-diskon en mia poŝeto kun ĉiuj kvar volumoj de la *Fabeloj* de Andersen).

La Esperantisto de la Jaro

<http://www.esperanto.org/Ondo/Ind-jaro.htm>

Pola Radio adiaŭas

La suba resumo estas kompilita laŭ la retejoj de *Radio Polonia* kaj *Gazeta Wyborcza*.

Je la naskiĝdato de Zamenhof, la 15an de decembro 2006, aŭdiĝis la lasta Esperanto-elsendo el Varsovio laŭ la formulo, ekzistanta ekde 1959.

En la lasta Esperanto-programo krom mallongaj aktualaĵoj kaj trarigardo de la pola gazetaro aŭdiĝis interparolo surbendigita en la germana Herzberg, la unua oficiala Esperanto-urbo. Ampleksan lokon en la lasta programo okupis la adiaŭo de la laborantaj kaj kunlaborantaj ĵurnalistoj de la Esperantoelsendoj: Barbara Pietrzak, Gabi Kosiarska, Milada Szwedo, Wojtek Usakiewicz, Maciek Jaskot kaj Janusz Myzik.

Ekde 16 dec ĝis la jarfino la programoj konsistas el la plej belaj eroj de niaj Esperanto-elsendoj ĝis nun elsenditaj.

La prezidanto de la Pola Radio Krzysztof Czabański informis, ke esperantlingvaj elsendoj ne malaperos. Estis alprenita decido — interkonsentite kun la pola ministerio por la eksterlandaj aferoj — pri la funkciigo de la esperantlingva elsendo podkasta en la interreta programo de Pola Radio. Ĝia funkciigo estas planata je 22 dec., se oni havos kandidaton por tiu laboro.

Czabański kiel “malbonŝancan kaj malĝustan” difinis la eliron de vicprezidanto de Pola Radio Jerzy Targalski pri la juda deveno de Zamenhof.

Respondante al demando de Agnieszka Kublik el la pola tagĵurnalo *Gazeta Wyborcza* “Ĉu vi vere referencis al la juda deveno de la kreinto de la lingvo Esperanto?”, Jerzy Targalski diris:

“Ne. Mi klarigis ke se Pollando elsendas programojn en Esperanto pro tio ke ĝi fieras pri Zamenhof, do ankaŭ Israelo devas elsendi en Esperanto, ĉar evidente ankaŭ ĝi fieras pri sia samnacionano” (jeśli Polska ma dlatego nadać audycje po esperancku, bo jest dumna z Zamenhofa, to Izrael też powinien nadać po esperancku, bo chyba też jest dumny ze swego rodaka),

kaj poste klarigis, ke la Esperanta Redakcio de Radio Polonia nun estas fermata, ĉar

“... per publika mono oni ne povas financi hobian movadon. Tiu mono estas forĵetita en koton. Estas aliaj justaj postuloj, kiuj bezonas financadon, ekzemple, plilongigo de la elsendado en la ukraina lingvo”.



UK-92: 23 azianoj invitotaj

En aŭgusto 2007 okazos la 92a Universala Kongreso en Jokohamo, Japanio. Kiom multe partoprenos en ĝi el aziaj landoj estas unu kriterio, per kiu oni taksos tiun ĉi UK-on sukcesa aŭ ne. Sed oni ne povas atendi nur spontanajn partoprenojn, ĉar ekzistas du ĉefaj obstakloj por la partopreno; multekosteco kaj vizo-problemo. La japana registaro severe kontrolas enirojn de azianoj. Japana Esperanto-Instituto (JEI) por solvi tiujn problemojn lanĉis projekton inviti aziajn aktivulojn; unue per subvencio el sia buĝeto kaj due per garantio al la registaro.

Aŭtune 2006 JEI aperigis anoncon pri tiu projekto en *Esperanto en Azio*, organo de Komisiono de UEA pri Azia Esperanto-Movado. Fine de novembro estis 54 kandidatoj el 14 landoj.

10 dec komitato de tiu projekto havis kunsidon kaj post longa diskuto elektis 23 kandidatojn. 8 homojn el iliaj Esperanto-klubo aŭ esperantistoj jam decidis akcepti kaj prizorgi kiel siajn gastojn, sed JEI serĉos prizorgantojn por la ceteraj 15 homoj kaj komencos aranĝi kondiĉojn de iliaj vojaĝoj al Japanio. Por plene sukcesigi tiun projekton ankoraŭ estos diversaj malfacilaĵoj, sed JEI kaj la invitkomitato firme decidis antaŭenigi la projekton. Ni petas pli da helpo de eksterlandaj kaj japanaj esperantistoj.

Elektitaj kandidatoj:

Taĝikio: Saidnabi Saidilhomzoda. Indonezio: Hazairin R. Junep. Nepalo: Apsana Giri, Shree Prasad Pokhrel (kun kondiĉo), Rajendra Manandha, Indu Devi Thapaliya. Ĉinio: Wang Shanshan, Zhang Yan, Wu Guojiang, Xiong Linping, Song Jingquan. Vjetnamio: Dao Mai Anh, Le Thi Hai Minh, Nguyen Thi Minh Nguyet, Nguyen Thu Quynh. Barato: A.S. Venkatesh Reddy. Mongolio: Dagva Gereltogtoh. Pakistano: Shabbir Ahmad Sial. Irano: Mohammad Reza Torabi, Hamzeh Shafiee. Ruslando: Fjodor Ĵulin. Filipinoj: Jeordan Sogue, Venus Cruz.

Hori Yasuo

Balotado en la Esperanta Civito

Okazis balotado por la Senato de la Esperanta Civito.

Balotejoj: Angulemo, Bujumburo, Ĉaŭdefono, Karakaso, Lomeo, Milano, Razgrado, Roterdamo, Varsovio.

Voĉrajtaj: 266. Balotis: 163 (61,27%). Voĉoj validaj: 159, el kiuj sindetenaj: 6 (3,7%); Nevalidaj voĉoj: 4 (2,45%).

Ruĝa Listo: Rooke 15 (elektita), Nuñez Hernández 14, Negrete 10, Papazov 10, Kouablan 6, Oguinye 5, Shestra 5, Petera 2.

Verda Listo: Silfer 91, Conde Rey 78, Trifonĉovski 58, Ŝelazny 55, Nguefack Zedong 47, Martinelli 37, Maĝarova 14, Gagliardi 12 (ok elektitaj proporcioj), Grisafi Favre 9, Picasso 9, Felszeghy 8, Hammarberg 7, Nilsson 7, Herrero Segura 6, Philippe 6, Gonĉarov 5 (ok elektitaj balotpremie), Emanuelsson 4, Beaumont 3, Grisafi 3.

Blanka Listo: Holevitch 22 (elektita), Lászay 22 (elektita), Birindwa 17, Rogora 14, Amstad 13, Thomas 10, Mihalkov 9, Nawrocki 8.

La nova Senato (oficonta ekde marto 2007: la eliranta daŭre oficas, kaj la Konsulo daŭre estas prof. d-ro hab. Walter Ŝelazny) enhavos do ankoraŭ tri grupojn, sed la opozicio konsistos el du, kaj ne plu el unu.

Laŭ intenco esprimita de la ĉefkandidatoj, la nova Kapitulo konsistos nur el Verdanoj, inspiritaj de tri dokumentoj: la Alvoko por Nova Maldekstro en Esperantio (2004), la Deklaro de FEM okaze de la Oka de Marto 2006, la Deklaracio pri la esenco de la afrika esperantismo (14 apr 2006).

Estas agrabla konfirmo pri la demokratieco de la Esperanta Civito, ke en la nova Senato sidos naŭ virinoj kaj naŭ viroj, plus la Konsulo. Kaj ĝuste virino estos la sola senatano el Afriko: Chamberline Nguefack Zedong el Kamerunio, nuna Vickonsulino pri la Tria Mondo.

La senatanoj rezidas en Bulgario, Francio, Germanio, Hispanio, Hungario, Italio, Kamerunio, Nederlando, Pollando, Ruslando, Svedio, Svislando. Kurioza detalo: nur dek unu el dek naŭ rezidas en la ŝtatoj, kie ili naskiĝis, kaj por kvin el tiuj dek unu tiuj ŝtatoj intertempe ŝanĝis radikale sian establosistemon.

Ankaŭ la alta procento de partoprenintoj estas rimarkinda: balotis pli ol 61% de la voĉrajtaj, kio pruvas fortan civitan konscion.

HeKo



En la naskiĝurbo de Ludoviko

Ĉi-jare la Bjalistokajn Zamenhof-Tagojn (8–10 dec 2006) partoprenis krom poloj gastoj el Ĉinio, Hispanio, Irano, Senegalio, Ukrainio.

Vendrede vespere ni vizitis ekspozicion en nia historia muzeo. Poste okazis amika rondo en la klubejo. Ĝi daŭris por kelkaj ĝis la 5a horo matene.

Sabate matene ĉiuj eksterlandanoj ekskursis kune kun niaj studentoj laŭ la spuroj de Esperanto kaj Ludoviko tra la naskiĝurbo de li. La oficiala parto de programo komenciĝis per prelegoj. Przemek Wierzbowski, gvidanto de la bjalistoka junulara rondo *Babelturo* rakontis pri Esperanto-junularo. Pastro Filimoniuk el la ortodoksa bjalistoka paroĥejo rakontis pri Bjalistoko en la tempo de Ludoviko. Antaŭ la monumento al nia Majstro internacia delegacio metis florojn. Ni ĉiuj bruligis tradiciajn “lumetojn de la paco”. Dum la Diservo kun la pastro profesoro Adamo. Unuafoje kunservis Esperante studentoj de la Alta Katolika Seminario, kiuj lernas Esperanton.

Vesperan programon en la kafejo *Fama* spektis ĉ. 150 personoj. Komenkis 6-jaraj infanoj, sekvis pli aĝaj kantistoj. La kabaredo *Talpeto* prezentis bjalistokan dialekton. Koruso *Kantylena* prezentis kelkajn kantojn el sia Esperanta repertuaro. Malgraŭ la malĉeesto de jubileanto, al ĉiuj estis proponitaj torto kaj kafo aŭ teo. La programo finis la ensemblo de balkanaj dancoj *Ha Taka*.

Dimanĉe ni vojaĝis ekster la urbo, vizitante belan Podlaĥion.

Przemek Wierzbowski

1906 kaj la sekvo

La zamenhofologia semajnfino de Kultura Centro Esperantista en Ĉaŭdefono ĉi-jare okupiĝis pri la ĉeftemo *1906 kaj la sekvo*, sub la gvido de Francisko Degoul, prezidanto de Scienca Instituto Zamenhof.

Dum la aranĝo premieris la eldonaĵo *Mi estas homo*: kolekto de gravaj tekstoj, originale verkitaj de Zamenhof kaj editoritaj de Aleksander Korĵenkov. Laŭ c-ano Degoul, temas pri vere utila manlibro enkonduke al zamenhofologio. Ankaŭ alia verko, aŭtorita de Aleksander Korĵenkov, utilis kiel referenco por la semajnfina ĉeftemo: *Historio de Esperanto*, aperinta en 2005, kie la eventoj de 1905–1906 estas profunde esploritaj.

La semajnfino esploris ankaŭ la rilatojn inter la zamenhofa penso kaj la framasonaj idealoj, liajn kontaktojn kun bahaismo, kelkajn ekzegezajn demandojn kun ankaŭ filologiaj referencoj.

HeKo

Gaje en Brazilo

86 personoj kunvenis en la kulturcentro Lélia Abramo de la brazila urbo San-Paŭlo 16 dec por kune festi la Zamenhofan Tagon. D-ro Floriano Pessoa Filho rakontis pri la vivo de Zamenhof. Antono Moreira, José Kalixto kaj Sonja Sanches prezentis kantojn. Poste ĉiuj kantis kaj dancis kaj disvastigadis librojn en Esperanto, ekzemple: unu persono devis aĉeti libron por donaci al iu.

Milene Rinaldi

Vieno: en la Pola Instituto

9 dec 2006 okazis en Pola Instituto de Vieno Zamenhof-festo kun 35 partoprenantoj, inter ili gastoj el Hungario kaj Ĉeĥio. Post salutado de reprezentantoj de Pola Instituto kaj Aŭstria Esperanto-Federacio, la unua parto estis dediĉita al William Auld. Pri lia verkaro prelegis prof. Heiner Eihner kaj s-ino Edit Slezak Tar. Aŭdiĝis ankaŭ la voĉo de Auld. Per recitado de poemoj de Auld finiĝis la unua parto.

Post filmo pri la Centra Oficejo de UEA, oni parolis pri perspektivoj de Esperanto en Aŭstrio kun speciala atento je la 150-jara naskiĝ-datreveno de Zamenhof. Post kantado de la himnoj Esperanta kaj Eŭropa sekvis germanlingva filmo *Koloroj de Pollando*.

Leopold Patek


Israelo honoras Zamenhofon

Post longaj klopodoj de Esperanto-Ligo en Israelo, la Israela Filatela Servo aperigis 17 dec la unuan poŝtmarkon pri Zamenhof en Israelo. Samtage ĝi estis stampata per unuataga stampo. Poste aperos memorfolio kiu surhavas la samajn poŝtmarkon kaj stampon.

La Filatela Servo akceptis la peton aperigi poŝtmarkon okaze de la 120a datreveno de la naskiĝo de Esperanto kaj la 90a datreveno de la forpaso de Zamenhof precipe dank’ al klopodoj de la israela esperantistino Malka Zemeli.

La israelaj esperantistoj turnis sin al la Filatela Servo multajn fojojn. Ili ĉiam substrekis, ke la juda ŝtato nepre devas aperigi poŝtmarkon honore al la judo Zamenhof. En 1967 tia poŝtmarko devis aperis okaze de la Universala Kongreso en Israelo. Sed ĉar la Kongreso estis nuligita, oni nuligis ankaŭ la emision de la planita poŝtmarko.

Josef Šemer



Pli ol 200 en Kaŭno

16–17 dec 2006 Kaŭno akceptis Zamenhof-Tagojn kun pli ol 200 esperantistoj el 19 litovaj urboj kaj gastoj el Latvio kaj Pollando.

Unue, en la ĉefsalono de la universitato Vytautas La Granda okazis la 42a kongreso de la Litova Esperanto-Asocio (LitEA). Post la himno de Esperanto kaj legado de salutmesaĝoj la prezidanto de LitEA Povilas Jegorovas raportis pri ĉefaj jaraj aktivajoj, elstarigis problemojn (financaj demandoj, junulara agado, ejoj en Vilno k.a.) kaj parolis pri estonta agado. Sekvis diskuto.

Post la fino de la kongreso pri “Etnolingvistikaj aspektoj de Esperanto” prelegis vicprezidanto de LitEA, prof. Aloyzas Gudavičius. Alian interesan prelegon faris la redaktoro de *Litova Stelo* Vytautas Šilas: “Kio logas litovojn en Kenigsberga-Kaliningrada areo?”. Estis montrita nova Esperanto-filmo *Gerda malaperis*.

Vespere koncertis flutistino Lidija Gomolickaitė-Grudzinskaitė, kantis Valdas Striužas, deklamis Jūratė Bartaškienė. Dimanĉe matene Sanktan Meson en Esperanto celebris mons. Lioginas Vaiciulionis en la universitata kapelo. Choe Taesok prelegis pri Ŭonbulismo kaj Esperanto kaj montris filmon pri ĝi. Kvizon pri la Esperanto-movado gvidis Nina Pietuchowska. Genovaitė Liepinia montris du filmojn: *Fringoj 2006* kaj *Kune en lern-ejon*.

Dum la Zamenhof-Tagoj funkciis riĉa libroservo. Oni povis aliĝi al BET-43, al la 92a UK, al la 7a Eŭropa Esperanto-Kongreso. Eblis aboni *Litovan Stelon* kaj aliajn Esperanto-gazetojn kaj pagi membrokotizon de LitEA kaj UEA.

Antaŭ, dum kaj post la Zamenhof-Tagoj pri ili vaste informis gazetaro, radio kaj televido, ne laste pro la gazetara komunikado de LitEA, kiun dissendis ambaŭ novaĵagentejoj de Litovio: ELTA kaj BNS.

Instituto pri eldonado de sciencaj kaj enciklopediaj libroj aperigis 1000 ekz-ojn de la libro de Rene Centassi kaj Henri Masson *Ŭmogus, metes išsuki Babeliui* (La homo, kiu defiis Babelon) pri la kreinto de Esperanto. El la franca lingvo al la litova ĝin tradukis Vytautas Rinkevičius. Ĉi tiu 264-paĝa libro estas nun vendata en pluraj librovendejoj de Litovio kaj en la libroservo de UEA.

Povilas Jegorovas



Choe Taesok prelegas en Kaŭno

Malferma Tago en nova medio

Prof. John Wells, iama prezidanto de UEA, estis la ĉefa gasto en la Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA sabaton, la 25an de novembro. Tiu ĉi populara aranĝo, organizita jam la 25an fojon, allogis 125 vizitantojn el 14 landoj. Unuafoje ĝia programo disvolviĝis en la nova konferencejo de la UEA-domo. La nova, bela aspekto de la antaŭa biblioteko kaj de la tuta rekonstruita unua etaĝo rikoltis multe da laŭdoj de la vizitantoj.

La ĵusa emeritiĝo de John Wells inspiris lin elekti kiel temon de sia prelego “Rigardi malantaŭen, rigardi antaŭen”, sub kiu li rakontis pri sia vivovojo persona, esperantista kaj profesia. Salutojn el Japanio portis Usui Hiroyuki, kiu parolis pri la kongresa temo de la Jokohama UK, “Okcidento en Oriento: akcepto kaj rezisto”, kaj faris personan omaĝon al la forpasinta William Auld, kies poemojn li japanigis. Usui precipe kaptis sian publikon per verva deklamo de la Aulda poemo *Ebrio*. Grandan intereson vekis ankaŭ la prezentoj de du novaj eldonaĵoj: tiu de d-ro Ziko van Dijk (antaŭe Sikosek) pri sia disertaĵo pri la politika historio de UEA kaj de Stano Marček pri sia rektmetoda instruilaro de Esperanto. Fine de la tago la publiko havis okazon diskuti dum unu horo pri aktualaĵoj de la agado de UEA kun kvar estraranoj, i.a. prezidanto Renato Corsetti.

La libroservo spertis viglan tagon. Kiel ĉiam, pleje furoris novaj eldonaĵoj. La unuan lokon okupis *Lingvo kaj popolo* de Humphrey Tonkin, de kiu vendiĝis 14 ekzempleroj, kaj la duan *La lastaj tagoj de Ada, Aduška* de Gian Carlo Fighiera (10 ekz-oj). Entute la libroservo vendis librojn kaj aliajn varojn por la suma valoro de 2784 eŭroj.

GK UEA

Landa kongreso en Ukrainio

28-29 okt en Kievo (la ĉefurbo de Ukrainio) okazis la 15a kongreso de UkrEA, en kiu ĉeestis ĉirkaŭ 25 esperantistoj. Multaj parolintoj pritaksis nekontentigan laboron de la estraro, sed konsiderante aktivan agadon de kelkaj kluboj (jalta, odesaj, kievaj), estis akceptita decido konsideri la laboron de UkrEA kontentiga.

La ĉefa programero, kiel kutime, estis elekto de nova Prezidanto. Anticipe neniu el ukrainiaj esperantistoj esprimis sian deziron okupi tiun poston. Estis proponitaj du kandidatoj: M. Lineckij kaj S. Vajnblat. Lineckij prezentis al la ĉeestantoj aferecan konkretan programon el kvin diversspecaj agaddirektoj. Vajnblat ne havis preparitan programon, kaj li anoncis nur ĝeneralajn pensojn pri plibonigo de la stato de la Esperanto-movado en Ukrainio, ĉefa el kiuj estis unuigo de ukrainiaj esperantistoj. Je granda miro de plejparto da ĉeestantoj (el kiuj nur 15 havis balotrajton) estis elektita la dua kandidato.

La sekvan tagon okazis io simila al “cerba sturmo”. Estis esprimitaj multaj konkretaj proponoj kaj proponetoj, kiuj, plej verŝajne, povos esti punktoj de nova laborplano de la Prezidanto.

Do restas esperi pri malrapida elrampo de ukrainia E-movado el nuna kavo. Pri grandaj ŝanĝoj dume ne temas...

La menciita problemoj ne estas nur nialanda... Bedaŭrinde, tio estas tendenco en la tutmonda Esperanto-movado. Kiuokaze la situacio povas ŝanĝiĝi?

Laŭ mia opinio, nur tiam, kiam ni mem ŝanĝos la ĝeneralan vidpunkton: ni ne forgesu, ke nur helpe de aktiva laboro de la esperantistaro asocia Prezidanto povas plibonigi staton de la movado. Sed gravas, ke ankaŭ Prezidanto havu aktivan pozicion kaj havu eblojn por efektiviĝi konkretajn ideojn kaj projektojn. Do la tasko de la Prezidanto devas esti ne nur unuigi jam ekzistantajn “fortojn”, sed aktivigi tiujn novajn, freŝajn, laboremajn kaj entuziasmajn. Kiel atingi tion en la sistemo, kiam la Prezidanto estas konsiderata ne “lokomotivestro”, sed “kroĉisto de vagonoj” — nur burokraato aŭ, en plej bona kazo, kunordiganto de eroj kaj eretoj de la movado, kiuj funkcias laŭ sia bontrovo kaj fantazio?.. Eble iam ni tamen atingos la veran ŝanĝon?..

Eŭgenia Slovaĉevskaja

Esperanto, la historia memoro

Dum la pasinta novembro okazis en Madrido (Hispanio), universitata internacia Kongreso pri la Hispana Intercivitana Milito. Ĝi koincidis kun la 70a datreveno de la komenco de tiu konflikto, kaj fariĝis la kulmino de la t.n. *Jaro de la Historia Memoro*, proklamita de la Hispana Parlamento por 2006. La kongreson organizis la Ministerio pri Kulturo, kun la kunlaboro de la Universitato je Distanca Edukado, kaj ĝin partoprenis pli ol ducent personoj, grupiĝantaj en 38 fakaj sesioj kaj pluraj pli ĝeneralaj konferencoj, plus diversaj solenaĵoj.

La organizantoj, kiel kutime en sciencaj kongresoj, malfermis kunvokon por la prezentado de komunikadoj. Inter la selektitaj troviĝis unu pri “La utiligado de Esperanto dum la Hispana Intercivitana Milito”, kiun prezentis la konata historiisto Ulrich Lins, aŭtoro de *La danĝera lingvo*, kaj la subskribanto, José Antonio del Barrio, direktoro de Fundación Esperanto.

Nia komunikado estis enkadrigita en la sesio “Gazetaro kaj ĵurnalismo”. Fakte, la prezentado ampleksis pli ol nur la propagandan flankon de la uzo de Esperanto.

Ni komencis priskribante la antaŭaĵojn de la Esperanto-movado en la jaroj antaŭ la eko de la milito kaj ĝia socia konsisto, por enkadrigi la rolon de la esperantistaro en la hispana tiutempa socio. Ni poste rakontis pri la grava rolo de kelkaj esperantistoj en la milito, kaj ĝiaj propagandaj sekvoj, inter kiuj diversaj novaĵoj pri la ekzisto de batalionoj de esperantistoj, kiuj poste montriĝis neveraj. La centran parton



José Antonio del Barrio kaj Ulrich Lins digne prezentis Esperanton.

okupis la prezentado de la diversaj gazetoj en Esperanto kiujn eldonis grupoj kaj partioj de la respublikana flanko, ilia propaganda efiko kaj la polemikoj vekitaj en iliaj paĝoj. Ankaŭ la aŭtoritatoj de la Respubliko uzis Esperanton, en oficialaj komunikoj, kaj en tre konata afiŝo kontraŭ la interveno de la faŝistaj landoj, eldonita de la aŭtonoma kataluna registaro (vidu malsupre). Ni aparte menciis la ekziston de esperantistoj apogintaj la dekstrulan flankon, sed ke ili ne sukcesis samgrade utiligi la lingvon pro la malfido de la tiufan-kaj estroj. Fine, ni komentis la gravan krizon okazigitan al la esperanta movado pro la milito, ĉu pro la persekutoj kaj ĉikanoj suferitaj de esperantistoj, ĉu pro la nefavora sinteno de la novaj aŭtoritatoj en la postmilitaj jaroj.

La prezentadon faris mi mem en la hispana lingvo, sed min akompanis Ulrich Lins, kiu povis ĉeesti la kongreson danke al vojaĝhelpo liverita de la organizanta komitato.

La komunikado vekis intereson de la ĉeestintoj, kelkaj poste kontaktis nin por komenti la temon aŭ por montri la konekton de nia movado kun aliaj kolektivoj tiutempaj. Estas substrekinde, ke Esperanto estis ĝis nun apenaŭ konata en fakaj historiistaj rondoj en Hispanio (kun la parta escepto de katalunlingvaj medioj, en kiuj ja ekzistas iom da faka materialo), kaj ni esperas ke tiu ĉi estu paŝo por ekforviŝi la oftajn antaŭjuĝojn ekzistantajn en ili pri nia movado.

La teksto de la komunikado aperos baldaŭ en publikigaĵo de la Kongreso.

Toño del Barrio

Diversgeneracia KAEST 2006

Konferenco *Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko*, kiu okazadas tradicie en novembro ĉiun paran jaron, fariĝis ĉi-jare vera renkontiĝejo de generacioj, ĉar aktive partoprenis kaj junaj studentoj, kaj pensiigintaj profesoroj. Nekutime granda nombro de junuloj el diversaj landoj fakte daŭrigis la seminarion E@I, organizitan komune de E@I kaj ĈEJ, kiu okazis antaŭ KAEST en Brno. Ne estas surprizo, ke al la konferenca ĉeftemo “Lingvo kaj Interreto” kontribuis plejparte junuloj, dum al la dua ĝenerala temo “Studoj el diversaj fakoj” precipe pli aĝaj esperantistoj.

Ne eblas menciĝi ĉiujn 16 altnivelajn kontribuojn, sed mi menciui almenaŭ tiujn, kiuj plej forte kaptis mian atenton: La prelego de Pavla Dvořáková (Ĉeĥio) “Multlingvaj tradukvortaroj en Interreto” portis al mi rigardon al utileco de interreto ankaŭ en la sfero, kiun mi ĝis nun malatentis. Villiam Búr (Slovakio) en sia kontribuo “Internaciigo de komputilaj programoj” brile klarigis, kiel eĉ la plej simplaj aferoj povas fariĝi malsimplaj kaj inverse. Kaj Ella Kurdrjašova (Ruslando) komencis sian prelegon “Lingvo de retaj reklamo kaj merkatico” per peto pri komprenemo, ĉar temas pri ŝia unua prelego en Esperanto kaj sekve prezentis la tre interesan temon kun bravuro de sperta preleganto.

Sed mi menciui almenaŭ kelkajn prelegojn el la dua “plenkreskula” temo. Pro mia intereso pri ekoturismo kaj ekologio ĝenerale mi devas menciui du prelegojn, kiujn mi aŭskultis kun akutaj oreloj, ĉar ambaŭ estis interesegaj por mi. Temis pri resuma prelego de Manfred Westermayer (Germanio) “Agendo 21 — Civitana Agado por Daŭrigeblo” kaj precipe tiu de prof. Rüdiger Sachs “Medioprotektado en Afriko”. Aliaj ĉeestantoj certe emfazus aliajn prelegojn laŭ siaj intereso kaj prefero.

La prelegokolekto enhavas la prelegojn kaj resumojn en la angla, la germana kaj la ĉeĥa lingvoj. La venonta KAEST okazos post du jaroj en novembro 2008, la jaro de la tridekjariĝo de KAEST, ĝis 1989 organizitaj alterne de la Ĉeĥa kaj Slovakia Esperanto-Asocioj kiel seminarioj AEST.

Partoprenantoj de KAEST (entute, 56 personoj el 11 landoj) kompilis la subtenan mesaĝon por daŭrigo de la Esperanto-sekcio de Radio Polonia.

Petr Chrdle

Viŝegrada konferenco

(*Eŭropa Bulteno*) En Bratislavo okazis 24–25 nov 2006 internacia konferenco “Perspektivoj de lingva politiko kaj lingvaj rajtoj en EU”. Organizis ĝin Eŭropa Domo de Bratislavo nome de la slovaka registaro kaj kadre de la ŝtatkunlaboro de la t.n. Viŝegradaj landoj: Pollando, Ĉeĥio, Slovakio, Hungario.

La konferencon malfermis vicprezidanto de Slovakio, Dušan Ĉaplovič. Partoprenis centoj da partoprenantoj el deko da landoj — oficialaj reprezentantoj de Viŝegradaj landoj kaj pluraj fakuloj, inter kiuj ankaŭ esperantistoj: Seán Ó Riain, Michael Cwik, Ilona Koutny, Eva Poláková, Jozef Reinart, Michele Gazzola, Lapo Orlandi, Ranieri Clerici kaj mi.

La laborlingvoj estis la angla, la franca, la slovaka, kaj Esperanto. La konferenco estis dividita je 4 partoj.

1. Kiel praktike estas realigata lingva politiko en EU?

2. Kion signifas globaligo kaj ekspansio de la angla por naciaj lingvoj kaj lingva diverseco?

3. Ĉu la internacia lingva komunikado povas havi utilon de planlingvoj?

4. Formuligo kaj realigo de lingva politiko en la Viŝegradaj landoj kiel membroj de EU.

La plej eminentaj prelegantoj estis Robert Phillipson el Danlando (Politiko de kunvivado kun la angla) kaj prof. Hugo Baetens Beardsore el Belgio (Interagado pri fremdlingva instruado inter Bruselo kaj ŝtatoj membroj de EU). Prelegis ankaŭ reprezentanto de Eŭropa Komisiono, Vladimir Šucha, sinjorino Druviete (eksministrino de Latvio) kaj pluraj aliaj.

La konferencanoj diskutis, interalie, pri tio, ke la problemon de la multlingvismo en Eŭropo kaj samtempan efikecon oni povas solvi per neŭtrala eŭropa lingvo kiu ne privilegius iun ajn nacion sed samtempe ebligus efikan komunikadon. Estis aŭdite, ke estas almenaŭ du ĉefkandidatoj por tia lingvo: Esperanto kaj la Latina. Oni menciis ankaŭ la indonezian kazon, en kiu al la simpla malaja lingvo oni aldonis multajn novajn terminojn el diversaj lingvoj kaj nun havas indonezian lingvon.

La konferenco pro tempomanko ne akceptis komunan rezolucion, sed ĝi akceptis resumon de la laboro kiun oni sendos al la slovaka registaro, al la registaroj de la viŝegradaj landoj kaj al la Eŭropa Komisiono.

Zlatko Tišljarić



Robert Phillipson: kiel kunvivi kun la angla?

Slovenio: parlamenta iniciato

Prof. Marko Pavliha, membro de la Parlamento de Slovenio, 14 nov 2006 prezentis al la parlamento skriban iniciaton, por ke Slovenio proponu al la Eŭropa Komisiono establi novan fonduson por financi eksperimentan edukon por eŭropa konscio en mezaj kaj fakaj lernejoj.

La edukado daŭrus unu lernejan jaron, 80 lernhorojn (2 horojn semajne) + septaga interŝanĝa vizito al alilanda junulara grupo, kiu edukiĝis per la sama programo.

A) 26 horoj (po unu horo por ĉiu ŝtato de EU krom la propra) pri la kulturo kaj historio de ĉiu el la landoj kaj ties kontribuo al Eŭropo kaj la mondo;

B) 38 horoj da lernado de la Internacia Lingvo Esperanto;

C) 6 horoj pri eŭropaj valoroj kaj identeco;

D) 6 horoj pri formoj de diskriminacio kaj batalo kontraŭ ĝi;

E) 4 horoj pri strukturo de la Eŭropa Unio.

La celo de la lernado de Esperanto estas ebligi kontaktojn kun gejunuloj el aliaj landoj ankaŭ por tiuj junaj personoj kiuj en la lernejoj ne sukcesis lerni fremdan nacian lingvon.

38-hora lernado de Esperanto ebligas al preskaŭ ĉiuj gelnantoj (90–95%) akiri bazajn turismajn konojn de la lingvo.

La posta celo estas iom post iom grandigi la reton en kiu estos urboj kun almenaŭ unu lernejo kun tiaspeca edukado, daŭre aktivigi la kunlaboron inter tiuj urboj kaj kreskigi la eŭropan konscion. En la reton enirus urboj per siaj decidoj, kaj oni povus nomi ilin eŭropaj Esperanto-urboj (jam ekzistas).

La slovena registaro povus en la jaro 2008, kiam ĝi prezidus la Eŭropan Union, proponi al la Eŭropa Komisiono establi ĉi tiun fondadon.

(Laŭ *Eŭropa Bulteno*)

Televida kurso

Kroata Televido preparis ses-eran TV-serion dum kiu lernanto instruas Esperanton al samaĝuloj. La ideo estas proponi facilan, instruon kaj amuzan programon dum januaraj vintraj ferioj. La kurso komenciĝos 5 jan 2007 en la programo *Bonan matenon, Kroatio*.

La ĉefinstruisto de la kurso estas knabino Tena, kiu partoprenis en la Internacia Infana Kongreseto en Prato kaj uzas materialon kaj sciojn akiritajn tie. Tena rakontos pri la Esperanta gramatiko kaj travivaĵoj per Esperanto dum tri minutoj ĉiumatene dum la kurso. La programon aranĝis instruistino Judita Rey Hudeček.

Spomenka Štimec

Lingva Festivalo en Moskvo

17 dec en Moskvo, en lernejo *Intelektual*, sukcese pasis Lingva Festivalo (pli frue tiaj kelkfoje okazis en Ĉeboksari kaj Uljanovsk).

La festivalon organizis moskva E-klubo MASI. Ĝin iamaniere partoprenis ĉ. 60 esperantistoj. Estis prezentitaj ĉ. 30 lingvoj: rakonto pri la lingvo mem, koncerna popolo, lando, historio, tradicioj ktp. Krom tio okazis ankaŭ prilingva kvizo.

Valentin Melnikov

28 nov 2006 forpasis pro kancero

Teo Jurukov (1929–2006)

populara bulgara aktoro kaj reĝisoro. Esperantisto ekde 1966, estrarano de la Bulgara E-Asocio, aktoro kaj reĝisoro en la Bulgara E-Teatro kun kiu li aktoritis en UKoj kaj en aliaj esperantistaj aranĝoj.

29 nov 2006 en Coulommiers pro longa malsano forpasis

Maurice Sujet (1920–2006)

emerita instruisto, eksdirektoro de la liceo en Coulommiers, aktiva franca esperantisto, esploranto de la Esperanto-movado.

4 dec 2006 en Rio-de-Ĵaneiro forpasis pro kancero

Vera Jordan (1948–2006)

instruistino, esperantistiĝinta en 2002, membro de KKE, kantistino. En septembro 2004 aperis ŝia unua disko *Esperanta Voĉo*, la aperigon de la dua disko malhelpis ŝia malsaniĝo.

12 dec en Sopot pereis pro aŭtomobila akcidento

Zdzisław Błażejczyk (1942–2006)

konata fotisto kaj esperantisto, aktivulo en *Monda Turismo*, gvidanto de foto-kursoj en Bydgoszcz.

Ni funebras kaj kondolencas.

Internacia Paroliga Semajno

Kiel ĉiujare, dum la lastaj jaroj komence de oktobro okazis en Dobřichovice apud Prago Internacia Paroliga Semajno (InPaSem). Kiel ĉiam, plejparto da partoprenantoj venis de Francio. Tio ne estas hazarda, ĉar InPaSem estiĝis laŭmende de francaj fervojistoj kaj nur dum sekvaj jaroj ĝi malfermiĝis ankaŭ al aliaj kaj tiel ĝi fariĝis internacia.

La partoprenantoj komence libervole elektis, al kiu grupo ili aliĝu. Komencintoj havis kurson de Esperanto, kiun per ĉe-metodo brile gvidis Stano Marček el Slovakio. Jamaj parolantoj povis elekti inter du paroligaj seminarioj: unu estis gvidata de Petro Chrdle el Ĉeĥio, la dua de Albrecht Kronenberger el Germanio.

Sed oni ne nur lernis. La lecionoj daŭris ĉiutage de la 9a ĝis la 12a horo kun unu paŭzo, sekvis kantado de Esperanto-kantoj (komune ĉiuj grupoj), kaj post la tagmanĝo sekvis turisma kaj kultura programoj. Ĉio-ĉi okazis en Esperanto (nur por la francaj komencantoj interpretis Jean Ripoch), do ĉiuj travivis kompletan semajnon en Esperanto-medio.

Paralele kun InPaSem okazis dum la lastaj tri tagoj Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA, kiujn sukcesis kvin el ses kandidatoj. Interesatoj partoprenis sabate posttagmeze Ekumenan Diservon en Esperanto, kiun kungvidis reprezentantoj de tri plej fortaj eklezioj en Ĉeĥio: katolika, evangelia kaj husana.

La venonta InPaSem okazos 24–30 sep 2007.

Petr Chrdle

Sur la foto: InPaSem: ne nur kursoj, sed ankaŭ ekskursoj (*Fotis Petro Chrdle*).



La 18a IKF, ĉu la lasta?

La 18a Internacia Kultura Festivalo kune kun la 27a Ĉeĥa-Saksa Tago okazis 8–10 dec 2006 en Ústí nad Labem (Ĉeĥio).

Ĝi estis dediĉita al la centjariĝo de elstaraj ĉeĥaj literaturistoj Jiří Kořinek kaj D-ro Tomaš Pumpr.

Pri Jiří Kořinek (1906–1988) parolis prof. Vlastimil Novobilský, menciante lian tradukan kaj originalan kreadojn. Al la kvindekda aŭskultantoj li prezentis unuhoran sonbendan intervjuon de la jubileanto.

Sekvis prelego pri d-ro Tomaš Pumpr (1906–1972) en prezento de Jiří Patera el Praha, kompletigita de Miroslav Malovec el Brno. Ili ambaŭ aprezis la rolon de Pumpr, kiu per siaj elstaraj tradukoj disvastigis konon pri la ĉeĥa literaturo tra la Esperanto-mondo. Liaj tradukoj en Esperanton fariĝis lingvaj pontoj, pere de kiuj ili estis tradukitaj en la lingvojn ĉinan, japanan k.a.

La sabata posttagmezo estis dediĉita unue al la spirita koncerto en la loka preĝejo de Sankta Paŭlo.

La ĉefa kultura programo okazis sabate vespere en la urba muziklernejo. La programon kompilis Miroslav Smyčka, kaj realigis ĝin en Esperanto plejparte profesiaj kantistoj kaj muzikistoj el Praha, Brno, Olomouc kaj Ústí nad Labem.

Dimanĉe okazis ekskurso al monto Ostry kaj banurbo Teplice. De tie la ĉeestintoj forveturis hejmen, bedaŭrante, ke la 18a Festivalo estis verŝajne la lasta, ĉefe pro manko de kunlaborantoj. La pezon de la preparlaboroj devis porti fakte nur tri personoj: Miroslav Smyčka, Vlastimil kaj Vera Novobilský.

Vlastimil Novobilský

Du fervojistaj renkontiĝoj

Ĉeĥa landa asocio de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF) ĉe Landa Asocio FISAIC ĈD aranĝis 9–11 nov 2006 en Plzeň sian 41an jar-konferencon. Kun partopreno de la delegitoj kaj aliĝintaj gastoj el kunlaborantaj landaj asocioj de IFEF el Aŭstrio kaj Hungario, kaj reprezentantoj de Ĉeĥa Landa Asocio FISAIC oni pritraktis la agadon dum la pasinta jaro kaj starigis planon kaj taskojn por estonteco.

Al la ĉefaj punktoj de la agado apartenas aktiva partopreno en la kongresoj kaj alia agado de IFEF, aranĝo de la du konferencoj jare por membaro, instruado kaj altigo de lingva nivelo de la membroj, fakaj prelegoj kaj ekspozicioj, partopreno en la terminologia laboro de IFEF, tradukoj de tekstoj por fervojaj muzeoj, resumoj aŭ subtekstoj en Esperanto en fakaj publikaĵoj, interpreto de mallongaj filmoj (en kunlaboro kun FISAIC ĈD), tradukado kaj aperigo de fakaj prelegoj kaj tekstoj k.a.

Al la konferenca programo apartenis ankaŭ fakprelegoj je temoj “ŠKODA entrepreno en Plzeň kaj ĝia kontribuo al fervoja trafiko” kaj “Trafiko en Plzeň-a regiono” (Jindřich Tomíšek) kaj “Vojaĝado al Ruslando kaj Baltmaraj landoj” (Zdeněk Polák), faka ekskurso al Muzeo Škoda Holding.

Pola Esperanta Fervojista Asocio (PEFA) aranĝis 1–3 sep 2006 sian 18an Kongreson en Siedlce kun 50 partoprenantoj el Pollando, Ĉeĥio kaj Germanio.

La programo de la kongreso estis eksterordinare riĉa. Post la inaŭguro la partoprenantoj estis gvidataj tra la urbo. Dum laborkunsido oni diskutis sian agadon.

Sabate (2 sep) ni ekskursis al Mińsk Mazowiecki, kie ni vizitis komputilan regejon, kiu prizorgas fervojan liniosekcion (90 km) de la fervoja linio E-20. Interesiĝon vekis ankaŭ pli posta vizito de la unika Besta fortimigilo, etnografia muzeo en Sucha, kie poste okazis amuza programo en naturo ĉe fajro kun rostado de kolbasoj, kantado kaj amuzaj konkursoj kun premio.

Dimanĉe en la stacidoma kapelo okazis katolika sankta meso en Esperanto kaj vizitado de la Muzeo de Johano Paŭlo II en la samnoma lernejo en Siedlce.

Jindřich Tomíšek

Per Esperanto pri Pollando

En Wanda, urbeto de la provinco Misiones, proksime al la akvofaloj Iguazú, nord-oriente de Argentino, en 1936 estis fondita komunumo de polaj enmigrintoj.

2–5 nov 2006 tie okazis internacia seminario pri pola kulturo. Partoprenis trideko da esperantistoj el Argentino, Brazilo kaj Urugvajo.

La Seminarion apogis la pola komunumo, pola ambasado, kaj Argentina Esperanto-Ligo. Ĝin gvidis Agnieszka Machota el Krakovo, dungita de la Pola Registaro por labori en Argentino kiel instruisto de la pola kulturo kaj lingvo inter la enmigrintoj. Ŝi estas esperantisto kaj parolas la hispanan.

La programo enhavis prelegojn, ekskursojn, polan folkloron, filmon, teatraĵon, kurson de Esperanto kaj konatiĝon kun la pola lingvo.

La partopreno estis senkotiza kaj ebligis konatiĝi kun la sudbrazila junularo, kun argentinaj esperantistoj, kaj viziti interesajn lokojn, interalie, la mondkonatajn akvofalojn Iguazú.

Oni parolis, dancis, kantis kaj promenis en Esperanta etoso kiel “familio”. Fine de la seminario estis proponite, ke venont-jare denove okazu Esperanto-kunveno por kunigi esperantistojn de la sudo de Ameriko.

Roberto Sartor

Plonĝo en la hindan animon

La elekton de “Gandhi, la bonfara” kiel la ĉeftemo de la 19a Renkontiĝo de Esperanta Kunfratiĝo de Okcidenta Rio (EKOR), okazinta 26 nov 2006, samideano Evandro Caboclo trafte difinis kiel “plonĝon de EKOR en la hindan animon”.

Pli ol 150 homoj en la lernejo Henrique Magalhães (Rio-de-Janeiro, Brazilo) kunvenis en la etoso de animvasteco atingita de la granda pacmisiulo.

Antaŭ la malfermo oni spektis sur granda lerneja ekrano la filmon *Gerda Malaperis*. Post la malfermo kaj kantado de *La Espero*, la trupo *Jun-ekor* surscenigis la teatraĵon *Intervjuo kun Gandhi*.

Sekve la renkontiĝanoj dividis sin en grupojn laŭ kategorioj veterana, vizitanta, junulara kaj infana por la tradiciaj “metiejoj”. La veteranoj ĝuis emociigan prelegon de Elmir dos Santos Lima pri la vivo de Gandhi, pri kio temis ankaŭ la dokumentfilmo “La animo de Hindio” poste prezentita al ĉiuj ĉeestantoj.



Sud-amerikaj esperantistoj ĉe la akvofaloj Iguazú (Fotis Agnieszka Machota)

Posttagmeze funkciis budoj de la grupoj aliĝintaj al EKOR, por prezenti la forton de la Esperanto-movado en Okcidenta Rio. En la *Arta Posttagmezo* muzikis Rinaldo Gallindo kaj Dirce Sales, kaj la infanoj de *Verda Koreto* kantis en Esperanto kaj ludis la skeĉon *La freneza Sciencisto*.

Post prezentoj de grupoj de cigana danco kaj de sahaja jogo, la organizantoj venigis la lastajn allogaĵojn, kun la jam kutima prezento de EKOR-kanto, la EKOR-ensemblo kaj lotumado. Fine ĉiuj kantis *La Esperon*.

Djalma Pessata

Paraiba Valo: jam la 66a

26 nov 2006 okazis en Porto Real (Brazilo) la 66a Esperanto-Renkontiĝo de la Paraiba Valo. Post salutoj kaj kantado de *La Espero* komencantoj en aparta ĉambro havis sian propran programon kaj ceteraj partoprenantoj ĉeestis prelegojn kaj debatojn.

Prelegis Sylla Chaves pri vortaro, esperantonimoj kaj poemoj, Jair Salles pri movada strategio, Givanildo Costa pri la graveco de la Brazila Konsilantaro de Esperanto, Alfredo Aragon pri kolektado de proponoj farataj al Brazila Konsilantaro de Esperanto, Robinson Matos pri la proksima Brazila Kongreso de Esperanto, Paulo Viana pri “guto da gramatiko”, Floriano Pessoa pri Zamenhof, Vicente Werneck pri filozofio pere de Esperanto, Carlos Pettinati pri la nomo mem de nia regiona renkontiĝo — kiu ankoraŭ ne estas tute fiksita.

Fine kantis brazilajn kanzonojn en Esperanto Sivia Buller, José Inácio kaj Givanildo Costa. Dum la tuta tago Kultura Kooperativo de Esperantistoj proponis budon kun riĉa libroservo kaj esperantaĵoj. Kvankam organizita de unu sola homo (Carlos Pettinati), la renkontiĝo estis plene sukcesa.

Paulo Sergio Viana

Unufraze

★ 13 dec 2006 en Vilno kadre de la respublika konferenco “Juda kultura heredaĵo: historio kaj nuntempo” prelegon “Zamenhof, Litovio kaj ideo de la internacia lingvo” faris Gediminas Degesys. (Povilas Jegorovas)

★ En *Globaliseringskonferanse* en Oslo E-informbudo disdonis centojn da informiloj pri Eo k vendis dudekon da ŝlosiloj k vortlistoj. (*Norvega Esperantisto*)

★ E-klubo de Salo (Finnlando) 2 sep kontribuis al la tradicia Salotago per ekspozicio en la urba biblioteko. (*Esperanta Finnlando*)

★ La plej legata bulgara tagĵurnalo *Trud* 2 dec 2006 aperigis tutpaĝan intervjuon de Mariela Baleva kun d-ro Giorgio Silfer. (HeKo)

★ Gerhard Walter, la urbestro de Herzberg am Harz, la unua E-urbo en la mondo, regajnis la balotojn ricevinte 67% de la voĉoj. (*Esperanto aktuell*)

★ La Mondan Socian Forumon en Najrobo fine de januaro partoprenos delegacio de la Esperanta Civito: sen. Dieter Rooke (vickonsulo pri socialaj aferoj), c-ino Etel Zavadlav k eventuale tria persono. (HeKo)

★ Juna esperantologo Usui Hiroyuki estis elektita de la Estraro de UEA por reĝisori la traktadon de la kongresa temo de UK-92: “Okcidento en Oriento: akcepto kaj rezisto”. (GK UEA)

★ Clay Magalhaes, Konstanta Kongresa Sekretario de UEA, 18–22 nov laboris en Japanio por UK-92 k renkontiĝis kun, interalie, la urbestro de Jokohamo, Nakada Hiroshi. (Landa Agado)

★ La Estraro de ILEI decidis, ke la E-centro en Herzberg funkcios kiel oficiala konstanta klerigejo de ILEI. (ICH)

★ OSIEK-premion (600 eŭroj) ĉi-jare ricevis André Cherpillod pro sia *Konciza etimologia vortaro*. (OSIEK)

★ Ĉeĥa E-Junularo kunlabore kun E@I okazigis 4-10 nov en Brno (Ĉeĥio) trejnseminaron “Lingvoj en Interreto” kun 19 gejunuloj k 4 trejnistoj el 9 landoj. (*Esperanto*)

★ Por malpezi la finanĉan ŝarĝon de la riparado de la UEA-biblioteko Hector Hodler oni akceptas donacojn; por donaco de 2 mil eŭroj la nomo de la donacinto (aŭ alia nomo) estos gravurita sur nomplato fiksita sur libroŝranko. (*Esperanto*)



Inda omaĝo al Milan Zvara

La lastan tagon de novembro estis senŝualigita memortabulo al la eminenta esperantisto Milan Zvara en *Paro Milan Zvara* en la slovaka urbo Poprad (en la urbocentro apud la rivero Poprad, apud la strato Štefanik). La ceremonion preparis Klubo de Popradanoj (KP), kies vicprezidanto estis Milan Zvara.

Dum la ceremonio alparolis la centon da partoprenantoj la prezidanto de KP inĝ. Skok kaj prezidanto de Slovaka Esperanta Federacio Juraj Gondžúr. La redaktoro de la revuo *Esperanto* Stano Marček salutis nome de UEA kaj tralegis leteron de la prezidanto de UEA Renato Corsetti. Plurajn mesaĝojn el eksterlando tralegis la ĉefdelegito de UEA Milan Neubeler.

Post alparoloj de lokaj naturprotektantoj, mikologoj kaj skoltoj, la eventon fermis per sia propra poemo s-ro Húska nome de Klubo de emeritoj.

Poste sekvis la plej grava momento — senŝualigo de la memortabulo, kiun realigis por la KP inĝ. Skok kaj por esperantistoj Laco Nullasz.

Post tiu ĉi programo sekvis neformala renkontiĝo de la partoprenantoj en proksima restoracio.

Milan Neubeler



Kongresejoj en Japanio 2007

Estas fiksitaj lokoj por la 92a UK en Jokohamo.

Kongresejo Pacifiko-Jokohamo: la ĉefkongresejo de UK-92.

Halo *Minato-Mirai*, antaŭ la ĉefkongresejo: Solenaj Inaŭguro kaj Fermo, Nacia kaj Internacia Vesperoj.

Muzika halo *Kenmin*: koncerto kaj teatraĵo marde kaj ĵaŭde.

Domo *ZAIM*: junulara kaj publika programoj tutsemajne.

Aliaj japanaj urboj gastigos tri pliajn aranĝojn:

La Infana Kongreseto: Esperantodomo de Jacugatake (Yatugatake), gubernio Yamanasi.

La 5a Nitobe-simpozio: en Sophia Universitato en Tokio.

La 40a Konferenco de ILEI: en Ŝtata Eduk-Centro por Virinoj en Ranzan, gubernio Saitama.

Tahira Masako

Oficiala kurso en Kalifornio

La Universitato de Kalifornio en San Diego anoncas starigon de oficiale aprobitaj kursoj pri Esperanto. Tiu kurso okazos somere kaj estos malfermitaj al la tutmonda esperantistaro.

La Universitato, konata laŭ la anglalingva siglo UCSD, estas unu el la plej konataj kaj prestiĝaj universitatoj en Usono. Inter ĝiaj profesoroj troviĝas ok Nobel-premiitoj. Ĝi situas apud la pacifika marbordo en suda Kalifornio, proksime de la landlimo inter Usono kaj Meksiko.

La kursaro daŭrigos la tradicion de la Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK), okazinta dum 30 jaroj en San Francisco kaj dum la lastaj jaroj en Vermonto. Honore al tiu tradicio, la nova kursaro en San Diego ĉi-somere pritraktos interalie la verkaron de la lastatempe forpasinta aŭtoro William Auld, la unua instruisto en NASK en San Francisco. La instruista teamo en somero 2007 konsistos el Paul Gubbins, kiu gvidos la superan kurson, kaj Lee Miller, kiu gvidos kurson por progresantoj. Grant Goodall, profesoro en la universitato kaj direktoro de ties lingva fako, estos la kursaro.

La kursaro okazos 9–27 jul 2007.

Por intervjuoj kaj pli ampleksaj informoj pri la kursoj: Grant Goodall <goodall@ling.ucsd.edu>.

Por informoj pri registriĝo, stipendioj, ktp: Ellen Eddy <eddyellen@aol.com>.

Humphrey Tonkin

Giorgio Silfer: alia Esperantio eblas

Giorgio Silfer estis elektita kiel Konsulo, nome prezidanto, de la Esperanta Civito por 2007–2011 per baloto okazinta samtempe en pluraj kontinentoj, kie kandidatis tri listoj kun propraj simboloj kaj konkurencaj programoj: la gajninta listo, kiun li gvidis, atingis du trionojn de la esprimataj voĉoj. Kion signifas ĉi tiu sukceso?

Respondo: Unuavice la venkon de la Nova Maldekstro en Esperantio: progresema, ekologiema, sed ne klasbatala. La Alvoko por Nova Maldekstro (aŭgusto 2004) estas fakte la ideologia platformo de la Verda Listo, kies ĉefkandidato mi estis, kaj kiu atingis la de vi menciitan procenton. Vidalvide al la krizo de tio, kio restas el la iama laborista movado, estas probable ke dum la venontaj jaroj firmiĝos nova opiniovado, aktiva per kaj por esperanto en pluraj kampoj (mondialismo, lingvaj minoritatoj, Monda Socia Forumo, Tria Mondo, rajtoj de la virinoj ktp), sed ekster la anarkiisma SAT kaj ekster la politike indiferenta UEA.

Demando: Renato Corsetti, elektita en 2001 kiel prezidanto de UEA fare de kelkdeko da komitatanoj laŭ unu sola, blokita listo, difinis sin “la prezidanto de ĉiuj esperantistoj”. Kaj vi?

Respondo: Mi estas esperantisto, kaj Corsetti neniam estis mia prezidanto, se escepti la monatojn (en 1972–1973) kiam li prezidis TEJO kaj mi estis TEJO-ano. Jure, la Konsulo estas la prezidanto de ĉiuj individuoj kiuj havas la Esperantan civitanecon, inkluzive de tiuj kiuj ne voĉdonis por li kaj lia programo.

Demando: Kiun lokon en tiu programo okupas la rilatoj kun UEA?

Respondo: Temas pri segmento ene de la rilatoj kun la establoj uzantaj esperanton, pri kiuj ne okupiĝos rekte la Konsulo, sed la Vickonsulo, sen. Marie-France Conde Rey: ŝi interalie vizitas ofte la UEA-kongresojn, kiel korespondanto de *Heroldo de Esperanto*. La Konsulo okupiĝos specife pri la rilatoj kun subjektoj ekster Esperantio.

Demando: Bone, sed ĉu vi povus klarigi ion pri la strategio de la Civito vidalvide al Universala Esperanto-Asocio?

Respondo: UEA estis invitita al ĉiuj forumoj kiuj kondukis al la promulgado de nia Konstitucio: 1998, 1999 kaj 2001. Alvenis neniu oficiala reprezentanto kaj neniu kontribuo, male ol faris SAT, kiu eĉ prezidis du el tiuj forumoj. La sinteno de la Civito al

UEA dependos de UEA mem. Mi opinias ke kun la UEA-anaro kaj la landaj asocioj ne ekzistis kaj ne ekzistos problemoj. Samtempe mi konscias ke en Internacia Esperanto-Ligo (rebaptita kiel Universala Esperanto-Asocio en 1947) ekzistas du malgrandaj cirkvitoj, kiuj klopodas stiri ĝin laŭ la propraj interesoj. La unua estas la heredantoj de la tradicia finvenkismo, kiuj strebis modernigi la strategion de UEA, ekde la Deklaracio de Tyresö ĝis la Manifesto de Prago. Kiel raŭmisto mi opinias (kaj la faktoj konfirmas) ke ili eraras, sed mi respektas generacion, kiu kapablis produkti vidpunkton. Dua malgranda cirkvito konsistas el homoj iom pli junaj, kiuj tamen produktis neniun vidpunkton, krom la opinio ke la centra oficejo estas pli grava ol la Estraro kaj la Komitato (mi uzas la majusklojn inverse ol ili). Temas pri cirkvito, kiu estas tre konfliktema, ankaŭ laŭ la eventoj en UEA dum 2001–2004. Kaj se Afriko turnis la dorson al UEA en 2006, tio estas “merito” de tiu cirkvito. Evidente ĉi-lastan cirkviton mi ne respektas, ĉar ĝi faris kaj faras nenion pozitivan por Esperantio ĝenerale kaj por UEA aparte. Fakte UEA bezonas tute novan generacion, trian cirkviton kiu kapablu regeneri ĝin. Sed tian mi ne vidas; ĉu vi?

Demando: La “polaj eventoj”, pri kiuj la Civita Senato starigis esplorkomisionon, kaj aliaj faktoj ŝajnas indiki, ke laŭ la Civita medio UEA havas ion por honti en sia ĵusa pasinteco. Ĉu tio ne povas influi negative al la dialogo, same kiel influas negative aliaj pure personaj antaŭjuĝoj, ĉe la de vi formulitaj cirkvitoj?

Respondo: Ne temas pri kvazaŭa suspekto, sed pri efektiva certeco, bedaŭrinde. Vi do tuŝas realan problemon, kiu ne fontas el personaj antaŭjuĝoj, sed el faktoj. Laŭ la erara supozo, ke la divido en blokoj daŭros almenaŭ dum la tuta vivo de la koncernatoj, la Tyresö-generacio parte kompromitiĝis kun la iamaj orienteŭropaj reĝimoj. Kaj notu bone, ke ne temas pri la akuzoj de Lapenna en la 1970aj,



sed pri eventoj en la 1980aj, eĉ nekonataj de Ivo Lapenna. Sialflanke, la raŭmistoj ne petas lustracion, sed almenaŭ la historian veron. Zamenhof difinis la internan ideon antaŭ cent jaroj en Ĝenevo, “Frateco kaj justeco inter ĉiuj popoloj”; li ne uzis la vorton “paco”, kiu por multaj nunaj esperantistoj (ekzemple, la nuna redaktoro de la UEA-organo) estas sinonimo de ajna trankvilo, eĉ je la prezo rezigni pri justeco kaj vero. Ĉi tie situas fundamenta etike-kultura diverĝo inter finvenkismo kaj raŭmismo, fakte. Neniu dialogo eblas, sen la supero de ĉi tiu diverĝo.

Demando: Kelkaj bedaŭras, ke vi utiligos vian tempon por la Civito anstataŭ verki. Kion vi opinias?

Respondo: Kelkaj nek rimarkas ke mi daŭre verkas, ne nur esperantlingve (certe, se ili traspuras nur “blogojn” en la reto, anstataŭ legi presajojn...), nek volas ke mi disvastigu esperanton, evidente. En la unua kazo, ĉe kelkaj mankas okulvitroj; en la dua kazo, ĉe la samaj malsufiĉas la amo al nia lingvo.

Demando: Kiu estas, laŭ la nova Konsulo, la plej urĝe solvenda problemo en Esperantujo ĝenerale kaj en la Civito aparte?

Respondo: En la malnova Esperantio, kie la individua plejmulto estas finvenkisma, jam mankas la fido en la fina venko, sed neniu kuraĝas diri: “ni eraris” — ŝajne oni preferas administri la lastan etapon ĝis la “fina malvenko”. En la nova Esperantio, kie ĉiuj individuoj estas raŭmistoj, temas pri kuro kontraŭ la tempo: ĉu sufiĉe rapide ekzistos tio, kio garantios la transvicon de esperanto en la nuna jarcento? Ja finfine la Civito ekestis tiucele. Bonvena estas ĉiu deziranta helpi por plenumi tiun celon.



En Romo antaŭ 50 jaroj. Tiam Britio ne estis membro de EU, kaj la angla lingvo ne estis oficiala en la Unio. Sed oni ja interkonsentis eĉ sen ĉi tiu mondolingvo.

Kune ekde 1957

(Vide el Bruselo) La Eŭropa Komisiono lanĉis grandiozan programon por pliproksimigi la Eŭropan Union al civitanoj. Kiel por ĉiuj programoj de EU, la Komisiono elpensis bonegan sloganon, nuranglalingvan, kompreneble: “Together since 1957”.

Tradukite la slogano signifas “Kune ekde 1957” kaj memorigas la kvindekajn datrevenon de la subskribo de la Traktado de Romo. Tiu traktado efektive signifas la komencon de la Unio kiel ni ĝin nun konas. Plie, laŭ la respondeca eŭropa gravulo Margot Wallström, la slogano “Together since 1957” sonas multe pli bone en la angla ol en la aliaj oficialaj lingvoj de la Unio.

Kompreneble, ne ĉiuj en Bruselo samopinias kun sinjorino Wallström. Hispana socialista deputito Carlos Carnero González eĉ konsideras ke maltaŭgas uzi sloganon en unu sola EU-lingvo, nome la angla. “La elekto de tiu slogano kontraŭas la Unian principon de lingva plureco, kiu estas unu el la fundamentaj demokrataj principoj sur kiuj estas bazitaj eŭropa integriĝo, — diris Carnero González. — Tute certe en tempo de krizo, ne pravas diskriminacii kontraŭ lingvoj kaj tio kaŭzos perdon da fideco en la Uniaj institucioj”.

Carnero González ŝajne volas, ke ĉiuj civitanoj estu egale reprezentitaj per slogano, ne nur tiuj kiuj parolas la anglan. “Pro tio, mi sugestas anstataŭigi la sloganon per simbolo kiu reprezentus nin ĉiujn, sen lingva aŭ alia distingo”. Laŭ Carnero González la Komisiono devas respekti kaj subteni la principon de multlingvismo.

Alia deputito, kiu multe pripensas la lingvan demandon, estas maldekstrulo Erik Meijer de Nederlando. Li volas interkonsenton kun estontaj membro-ŝtatoj de Eŭropa Unio en eks-Jugoslavio por eviti, ke EU traduku kvarlingven. La lingvoj de Kroatio, Serbio, Montenegro kaj Bosnio estas ege similaj, kaj de multaj homoj estas konsiderataj kiel la sama lingvo, la serba-kroata.

“La reorganizado de la landlimoj instigis la kultivadon kaj akcentadon de lingvaj diferencoj, kiuj ekzistis antaŭ 1918. Tamen uzantoj de tiuj lingvoj ankoraŭ povas kompreni unu la alian sen interpretistoj kaj tradukistoj”, — diris Meijer. Li volas ke la Komisiono, pro la fakto ke Kroatio aliĝos al EU antaŭ la aliaj eksjugoslaviaj ŝtatoj, jam nun pripensu kion fari: “Se oni nun ne faras akordojn, tio signifos ke la kroata fariĝos aparta oficiala lingvo de EU ekde eniro, sen konsidero de ĝia proksimeco al aliaj lingvaj variantoj”.

Meijer timas ke la Komisiono, ignorante la problemon, kondukos al situacio en kiu estos tradukistoj kaj interpretistoj por la bosna, serba, kroata kaj montenegra. La sola ĝisnuna respondo de la Komisiono ne diras multe: “La Komisiono konscias pri la lingva situacio en tiuj ŝtatoj kaj agnoskas la koncernon rilate al la ebla estonta efiko pri eŭropaj tradukaj kaj interpretadaj servoj”, — diris Olli Rehn, membro de la Komisiono respondeca pri pligrandiĝo. “La Komisiono ankaŭ estas konscia pri la sentebleco de la ligo inter lingvo kaj ŝtateco. La difino de oficialaj Komunumaj lingvoj por novaj membro-ŝtatoj estas demando por alirnegocadoj”, — notis Rehn.

Dafydd ab Iago

Mortiga perfido

Ĉu Dafydd ab Iago povus aranĝi la plusendon de tiu ĉi letero (reage al la decembra *Vide el Bruselo*) al sinjoro Figel’?

«Kara Sinjoro Figel’,

La propono uzi Esperanton kiel pontlingvon en la Eŭropa Unio estas nur malgranda demarŝo cele al haltigi la jaganatan* progreson de la usonangla tra tuta Eŭropo.

La kultura enteno de la proponata lingvo, kvankam granda, ne rolas rolon en la afero.

Se sinjoro Figel’ ne konscias ankoraŭ pri la danĝero, li aŭskultu la parolojn de Günther Oettinger, ministro-prezidanto de la germana provinco Baden-Virtembergo: “La angla fariĝas la laborlingvo. La germana restos kiel lingvo de familio kaj libertempo”.

Se la forta germana lingvo tiel estas minacata kaj ene kaj ekstere, kio pri la gepatra lingvo de sinjoro Figel’? Bonvenigi, aŭ eĉ toleri la anglan kiel internacian komunikilon estas mortiga perfido al la gepatra.

Hazardas, ke la uzokostoj de Esperanto en EU estus multe malpli altaj ol tiuj de la angla. Sed eĉ se tiel ne estus, neprus ĉiel defii la privilegian statuson de la angla en la eŭropaj instancoj. La kostoj de l’ neniofarado estas nekalkuleblaj».

Breandán Ó Mearáin

* **Jaganata.** La sanskrita vorto *Jagannatha* (Mastro de la Mondo) rilatas al dio Viŝnu, kiu kutimis rajdi en grandega ĉaro, sub kies radojn multaj kredantoj ĵetis sin sinofere (angle *juggernaut*, germane *Jagannath*).

Aŭtuno estas eble malserena

Aŭtuno estas eble malserena.

Tamen:

Ĝangalo estas en kriza situacio, sed klopodas vendi sin aŭ iel savi sin. *Fonto* ne malaperas, sed nur paŭzas, kaj estas studata reaperiga plano. La Esperanto-redakcio de Radio Polonia estas en danĝero, sed eblas plubatali kontraŭ ĝia malapero.

Kompreneble se ni rezignemas, se ni mem ne klopodas laŭ niaj rimedoj rebonigi la situacion, certe estas grandaj riskoj, ke ĝi restos malbona. Sed ni ne simple konstas la problemojn, ni reagas! Defetismo ne helpas. En la historio ĝenerale, kaj en la historio de la esperanto-movado, el iuj krizoj povas naskiĝi io nova kaj pli bona. Kondiĉe ke ni ne restu spektantoj, sed estu agantoj.

Estu printempo en la aŭtuno.

Claude Nourmont

Tri groŝoj en la poŝoj

Post tiom da argumentoj kontraŭ PMEG (LOdE-145) mi rajtis atendi iom da objektaj objetoj, almenaŭ ion, kio klarigus (aŭ deklarus) la principojn, indikus la teorion bazon, pravigus la metodon (se ĉio-ĉi ekzistas). Bedaŭrinde, miaj oponentoj preferis eviti rektan disputon. Mi ne neas, ke tia taktiko povas havi efekton, sed nur konstatas ilian faktan kapitulacion en ĉiuj centraj punktoj de miaj akuzoj.

Antaŭ ĉio, du vortoj pri “rabia kaj insulta” tono de mia eseo. Laŭ s-ro Wennergren ĝi apogeas en dufoja ripeto de la termino “demenco”. Temas pri evidenta miskompreno. Per tiu aflikta vorto mi karakterizas ja ne la aŭtoron, sed staton de l’ menso de la *leganto*, kiam li kontaktiĝas kun iuj strangajoj de la teksto. Efektive, kiam oni legas duoncentan liston de verboj kun certaj komentoj, ekzemple, “morti — perdi la vivon”, “danci — sin movi dance”, oni sentas sin idioto.

“Kris ne estas kompetenta por recenzi tian verkon kiel PMEG”, — konkludas la aŭtoro de la gramatiko el tiu sola fakto, ke mi preferas la formon “gastumi” al “gasti”. Ĉi-lastan kaj similajn ja uzis Zamenhof, do mi ne konas la Zamenhofan lingvouzon.

“Al Vi, kiu kreas, al Vi, kiu *reĝas*”, — citas s-ro Wennergren, instruante min pri la klasika stilo. Knabaĝe, 10-jarojn antaŭ la esperantistiĝo de s-ro Wennergren, mi recitis la samajn versojn de Zamenhof, fascinite de la bela poezio kaj sentis la sekvontan “Hodiaŭ ni *preĝas*” sufiĉa por pravigi la poetan elekton. Ĝis nun mi tiel pensas, sed samtempe vidas logikon en la iama kritiko de malfortuna Couturat.

Tiel, nominte min profano, s-ro Wennergren forlasas la kampon de batalo ne trovinte tie dignan rivalon.

La sagaca alegorio de s-ro Espondo aludas pri mia inkvizitora pedanteco, kiu senkolorigas la gamon de la lingvo. Ĉu aŭtente hazarda kunŝmiro de la koloroj promesas belan gamon? Kion do signifus tiukaze la averto de poeto:

Confusion will be my epitaph?

La repliko de Kalle Kniivilä rivele indikas alian fundamentan mankon de la recenzanto — nome orienteŭropan originon.

— Kial PMEG devas mencii rusan gramatikan kategorion [tiun de *aspekto* — AK] kiu, laŭ la rusa recenzanto eĉ ne ekzistas en Esperanto? — demandas s-ro Kniivilä kun konjektebla afekcio, ĉar li tute preterpasas ĝuste la ĉi-koncernan respondon tre detalan. *Hindeŭropane al nehindeŭropano* mi rediru al mia oponento, ke temas ne pri unike slava, sed tute grandfamilia kategorio kies manko en Esperanto, ve, reale kaŭzas al la hindeŭropa lernanto certajn embarasojn. Mi ne kompetentas pri la finna, sed povas sen granda risiko supozi, ke la aspekta kategorio tiel aŭ alie esprimeblas ankaŭ en ĝi. Simple ĉar tio estas esenca, ontologia, ekzista kategorio. *Orienteŭropane al eĉ plia orienteŭropano* (geografie Finnlando estas ja pli orienta ol Kaliningrado) mi diru ankaŭ, ke mia oponento ŝajnas forgesi sian iam tre nemalbonan rusan kaj maltrafe fantazias ne nur pri “Orienta sistemo” de respondoj, sed ankaŭ pri *rusaj radikoj* de la atribuita al mi “seksismo”. Tute kontraŭ lia aserto, la rusoj ĉiam diras pri virino “*doktoro Ivanova, profesoro Petrova*”.

Tri argumentoj po unu de ĉiu: profano, pedanto, orienteŭropano. Ĉu ne riĉe? — En iu senco, tute sufiĉe.

Alen Kris

Manipulebla gramatiko


Mi ege aprezas la grandiozan iam kompletigitan fundamentan verkon de Bertilo Wennergren, ja studon paralelan al la PIV, novan etapon en la historio de esperantologio, bazon por plua evoluo. “Ne surbaze de klasikaj ŝablonoj, sed elirante el la lingvo mem”, — emfazas Kalle Kniivilä kaj ankaŭ mi, elirante el propra sperto propedeŭtika kaj serĉado de elementa kompendio. Ja Esperanto estis (kaj restas) adresita ne al lingvemaj eruditoj, sed al problemaj handikapitoj. La radiko “handikap” estas ja dusenca (1. trudo de malfacilo al unuj, 2. faciligo al aliaj), sekve la intereso de la problemhavaj estas prioritataj. Do konsekvenca klaran gramatikon klarigi senpere, sen balastaj terminoj, sed laŭ evidenta orientiloj pri vortaj roloj kaj rilatoj. Nome, per la vortofinaj etiketoj, je kiuj la Komencinto zorge provizis sian verkon, dediĉitan al diskriminaciitaj, diskriminaciataj kaj diskriminaciotaj komencontoj. Krome kaj des pli ke ili devas aliri I Lon neĝenate de nacilingva tradicia rutino.

Komencanto rajtas konstrui plej simplan frazomapon laŭ plej malmultaj rektaj orientiloj — 5 finsilabaj vokaloj kun 2 aldonoj (j kaj n), kaj agofinaĵo S kun 4 vokalaj variantoj kaj 5 tabelaj finaĵoj por apartaj cirkonstancoj (-am, -om, -al, -el, -es). Komence necesas kaj sufiĉas distingi kaj atenti konkretajn vokalojn. Morfemoj kaj parolpartoj atendu sian etapon. Anstataŭ la 16 principaj reguloj — 16 konkretaj neakcentitaj vortfinoj, kiujn oni devas klare aŭdi kaj aŭdigi, por ne resti eterna komencanto, ligita al skribo.

La aŭtoro de PMEG apenaŭ respondos per repliko al tia naŭva litera/numera ekspliko, intencita nur por la unua, sed ne plua kaj ne lasta paŝo. Ĝi estas nur truko didaktika kaj mnemoteknika, fakte nur praktika “fingra gramatiko”, sufiĉa por improvizado en komenca stadio. Ankaŭ ĝi ne estas tute senkomplika, ĉar finvokaloj A, U, I havas plurajn funkciojn. Tio tamen provoku ne kritikon, sed etimogramatikajn demandojn. Kial Zamenhof elektis la pronoman finvokalon U ĝuste al la numeraloj 1 kaj 2? Kial nur 1 estas plursilaba, kiel ĉiuj pronomoj, dum ĉiuj ceteraj unuforme unusilabaj? Kial la numeralo 3 finiĝas per la sama finvokalo I — kiel ĉiuj 9 personaj pronomoj en Esperanto? Kial ĉiuj pluralaj objekt-kazoj ĝis nun portas tiajn komplikajn finaĵojn: AJN, OJN, UJN? Ili estas oportunaj nur en skribo kaj sur QWERTY-klavaro, sed plumpaj en parolo. Kiam Esperanto estos vaste uzata buŝe (nun ja nur 10%), ĉu ili simpliĝos almenaŭ prononce (samkiel okazis en la angla antaŭ kelkcent jaroj), tamen konservante la rekoneblecon (malsame ol en la angla)?

Demandu do kuraĝe, sed ne kritiku malsaĝe (PIV, pĝ. 626).

Valdo Banaitis



Dujara jubileo ĉe *Indymedia Barcelona*

La esperanto-eldono de la alternativa sendependa novaĵejo *Indymedia Barcelono* (http://barcelona.indymedia.org/?lang=eo_EO) dujariĝas. Ĝi estis aprobita 9 sep 2004 de la asembleo de *Indymedia Barcelono*, kaj post du monatoj kaj duono da streĉa laboro, ĝi estis lanĉita 25 nov kaj fariĝis unu el la ĉefaj inform-projektoj de Kataluna Esperanto-Asocio por diskonigi kaj normaligi la uzon de esperanto en la lokaj neesperantistaj medioj.

Indymedia estas granda reto prizorgata de grupoj en la tuta mondo kaj organizata per retlistoj kaj asembleoj. La projekto *Indymedia* naskiĝis okaze de la manifestacioj kontraŭ la kunveno de la Monda Organizaĵo pri Komerco en Seatlo en 1999. La informcentro tie aranĝita funkciis kiel renkontiĝejo, kie ĵurnalistoj povis trovi informojn kaj/aŭ publikigi siajn proprajn. Unu jaron poste, en kunveno en la okupita domo Espai Obert (Malfermita Loko) en Barcelono oni decidis krei *Indymedia Barcelona*, danke al la laboroj de aliaj *Indymedia*-centroj kaj al volontula laboro. Ĝi fariĝis la unua centro funkcia en Eŭropo. De tiam *Indymedia Barcelona* kreskis ĝis ĝi fariĝis tio, kio ĝi nun estas: libera kaj kolektiva loko, kiu permesas, ke esprimu sin individuoj, socialaj movadoj kaj ĉiaj organizoj sen eblecoj aliri la amas-komunikilojn. Sur tiu bazo, la asembleo de *Indymedia Barcelona* decidis en septembro 2004 prezenti esperanton kiel novan lingvan eblecon por legi la ĉefartikolojn. Per esperanto ĝi “celas kontribui al pli justa mondo, en kiu neniu, pro naskiĝo aŭ ekonomia nivelo, havu pli da eblecoj scipovi la superregantajn lingvojn; t.e., ĝi celas eviti diskriminacion pro lingvaj kialoj”. Per tio esperanto prezentiĝas samnivele apud la kataluna, la hispana kaj la angla.

Du aliaj *Indymedia*-eldonejoj havas esperanto-eldonojn: la brazila, kiu pioniris (<http://www.midiaindependente.org/eo/blue/>), kaj, en multe malpli alta grado, la poste aperinta belorusa (<http://belarus.indymedia.org/>).

Dum tiu dujara laboro estis regule tradukitaj ĉiuj ĉefartikoloj — entute pli ol 200 — fare de plurkapa skipo, en kiu nuntempe aktivas ĉefe Joan Català, Jomo Milla kaj Miquel Gómez. Temas pri postulema tasko, ne nur ĉar traduki malfacilas, kaj pli de la propra nacia lingvo al esperanto ol inverse, sed ankaŭ ĉar la sociala enhavo, ne kutima en esperanto-medioj, postulis la evoluigon de specifa terminaro, kreata de la kunlaborantoj mem. Danke al ĝi, kaj al la formika laboro de la laboroteamo, ĉ. 500 terminoj, kiaj “kontraŭ-tumulta policano”, “seksa sieĝo en la laborejo” aŭ “kaserol-protesto” fariĝis kutimaj por la regulaj legantoj de *Indymedia Barcelono*.

Kataluna Esperanto-Asocio



Kiu rajtas kion?

En *Apneau birdebla fileĉo* mi skribis: “Ŝi ludis *kun* la piedfingroj”. Bedaŭrinde, Chr. Declerck (LOdE-145) sepfoje ne komprenis, ke oni povas ludi *per* kaj *kun* la piedoj.

A) **Per** estas prepozicio montranta organon aŭ membron, kiun oni uzas por fari ion: “Mi vidas *per* la okuloj kaj *flaras per* la nazo”.

Do “Mi ludas futbalon *per* la piedoj” signifas, ke miaj piedoj ludas *kun* la pilko, kiu estas la ludilo.

“Ludi **kun** la piedoj” havas tute alian signifon. Se mi ludas *kun* miaj piedoj, estas ne miaj piedoj, sed miaj manoj, kiuj ludas. Estas miaj manoj, kiuj ludas *kun*, kaj certe ne *per* la piedoj, ĉar piedojn miaj manoj ja ne havas. Kaj miaj piedoj estas ludilo kiel pupo aŭ pilko.

Do “Mi ludas *kun* miaj piedfingroj” signifas, ke mi ludas *per* miaj manoj *kun* la piedfingroj, kiuj estas la ludilo.

Laŭ la logiko de Declerck, mi devus skribi: “Mi ludas *per* miaj manoj *per* la piedfingroj”. Sed tio estus sensencaĵo.

B) Jes, la vorto *admeti* estas neesperanta. Sed pri mia fuŝa Esperanto kulpas neniu alia ol Declerck mem. En lia tuta verkaro troviĝas neesperantaj vortoj: *kaŭm, noĥ, erst* (germane: *kaum, noch, erst*); *suĵeto, partuzo, brikoli* (france: *sujet, partouze, bricoler*); *smajlo* (angle: *smile*).

Sed Declerck eble opinias, ke nur li havas la rajton uzi neologismojn: *Quod licet Jovi, non licet bovi*. En bona Esperanto: *Om ĵo tuĵus darfus, obs never soltas!* (germane: *dürfen, sollen*; leceburge: *jo*; volapuke: *om, obs*; france: *toujours*; angle: *never*). Li ja ĉiam rajtas fari tion, kion ni neniam faru!

A+B=C: Tamen mi ĝojas, ke almenaŭ unu leganto legis mian tekston, eble *kun* batanta kor’, sed nepre *per* siaj okuloj.

Jean-Marie Ries

Malabono kaj donaco

Post multaj jaroj kiel abonanto, mi volas ĉesigi mian abonon. La kialoj estas pluraj. Laboro, du infanetoj kaj diversaj aliaj okupoj prenas mian tempon. La malmultajn liberajn horojn mi prioritatas por aliaj aferoj ol Esperanto. Rezulte, la lastajn jarojn mi nur supraj trafoliumas *La Ondon*, same kiel aliajn esperantoperiodaĵojn. Ĝis nun mi reabonis por subteni “bonan aferon”, sed ne povas tiel daŭrigi eterne.

Do, kiel adiaŭon, por la venonta jaro mi pagos abonkotiĝon, sed petas vin ne sendi la gazeton.

Se iel ŝanĝiĝos mia vivsituaĵo, tiel ke mi denove havos pli da tempo, aŭ se altiĝos mia intereso pri la esperantomondaj kvereletoj kaj kursraportoj, mi ja konsideros reabonon.

Cetere, la venontan jaron nia familio verŝajne trapasos en Ugando, kie mi partoprenos interŝanĝan programon kun la uganda UN-asocio.

Bård Hekland

Malabono pro atako

Kun granda miro mi legis en decembra numero de via, ĝis nun tre ŝatata de mi revuo, tekston, kies aŭtoro ege arogante, malrespekte kaj nekredible krude atakas polan registaron. Kompreneble tia brutala atako ne povis ne ofendi multajn niajn membrojn. Pro tio kun granda bedaŭro mi devas sciigi vin, ke nia organizo ne plu povos aboni kaj popularigi vian revuon.

Lech Piotrowski,
prezidanto de la Varsovia Filio de PEA



1.

Mi amas la homaron. Homoj estas mirindaj estaĵoj. Plenaj de kreemo kaj inventemo. Ne ekzistas muzikilo, kiu havas pli bonan sonon, ol la homa voĉo. Ne ekzistas pli belaj artaĵoj ol tiuj, kiuj bildigas la homan korpon. La progreso en la kampoj de scienco kaj teĥniko en tia tempo estas senkompara kaj atestas pri la mirindeco de la homa cerbo. Pri la samo atestas la literaturo kaj la muziko, kiuj povas ridigi, timigi aŭ malĝojigi homojn.

Mi amas la homaron. Malĝojigas min nur ke tiom da problemoj turmentas ĝin. Sangon soifantaj glavoj dum jarmiloj suferigis sendefendajn civilulojn. Tial la homaro ne sukcesis forigi malsaton, malgraŭ la progreso en scienco kaj teĥniko. Se ne estus milito ni povus venki ĉiujn malsanojn. La homaro povus vivi tute feliĉe. Se ne estus eternaj bataloj inter la homoj, ni povus havi harmonian socion.

Alia problemo estas diskriminacio. Oni rifuzas la homajn rajtojn al kelkaj homoj. Tio estas skandalo. Oni devas tuj forigi diskriminacion ĉiaspecan. Seksan, rasan, lingvan, religian.

La homaro jam atendis dum jarmiloj por ke iu okazu. La tuta mondo ĝemadis kaj sopiradis ŝanĝiĝon. Kial neniu faris ion? Kial la registoj ne estas agipovaj? Kial nenio okazas? La problemoj restas la samaj. Mi ne havas esperon. Kion fari?

Tial mi publikigas tiun ĉi retpaĝon. Ĉu iu el vi havas iun ideon?

2.

Dankon al tiuj, kiuj respondis al mia retadreso. Vi redonis al mi penson ke ankoraŭ estas espero. Sed tion mi sciis

jam antaŭe. Mi amas la homaron. Homoj estas mirindaj estaĵoj. Plenaj de kreemo kaj inventemo. Sangon soifantaj glavoj dum jarmiloj suferigis sendefendajn civilulojn, sed nun estas tempo forigi ĉion malbonan. Mi ne obeos al tiuj el vi, kiuj invitis min aliĝi al diversaj organizaĵoj. Mi ja scias kiom da malbono ekzistas en la organizaĵoj. Politikistoj nur utiligas siajn privilegiojn por havigi al si avantaĝojn. Ne ekzistas organizaĵo sen skandaloj. Mi ne amas organizaĵojn, sed mi amas la homaron. Ni bezonas ion tute novan por krei harmonian socion.

Multaj el vi komprenis la samon. Ne utilas partopreni en ekzistantaj organizaĵoj. Ni devas krei ion tute novan, kio ne devas treni malnovan balaston.

Estas pli bone lumigi kandelon ol malbeni la mallumon. Ĉu ne? Tion diris iu saĝa homo. Mi ne plu memoras kiu. (Dankon al vi, kiu donis tiun citaĵon.) Ĝi donis al mi esperon. Mi volas fari ion signifan por la homaro. Ni bezonas mondplibonigon. Tuj ni povas realigi tion, kion la homaro sopiris dum jarmiloj.

La homoj povas aliĝi al nia idearo respondante al mia retadreso.

3.

Mi amas la homaron. Homoj estas mirindaj estaĵoj. Plenaj de kreemo kaj inventemo. Mi komprenas ke multaj el vi planas respondi al mia alvoko, sed ankoraŭ ne trovis tempon. Tamen kvar homoj respondis kaj ili nun kune kun mi formas proparolantaron. Ni ne havas estraron, ĉar ni neniel volas estri aliajn homojn. Ni nur volas esti proparolantoj de ĉiuj niaj apogantoj, kiuj ankoraŭ ne aliĝis al nia organismo. Ne, ni ne estas organizaĵo, ĉar organizaĵoj estas plenaj de nehonestaj trompuloj. Ni estas organismo, kiu konsistas el la tuta homaro. Ne ĉiuj konscias ke ili estas membroj de la tuthomara organismo. Tial niaj proparolantoj devas paroli ankaŭ por ili, same kiel la buŝo parolas por la tuta korpo.

Mi estas la cerbo kaj interreto estas la nervoj, kiuj konektas min kun vi. Nur alklaku ttt.mondplibonigo.org kaj

vi trovos min. La progreso en la kampoj de scienco kaj teĥniko en tia tempo estas senkompara kaj atestas pri la mirindeco de la homa cerbo. Tial mi amas la homaron. Malĝojigas min nur ke tiom da problemoj turmentas ĝin. Sangon soifantaj glavoj dum jarmiloj suferigis sendefendajn civilulojn. Baldaŭ tio ĉesos. Baldaŭ venos la liberigo.

4.

Mi amas la homaron kaj la homaro amas min. Mi ĵus legis en gazeto ke la gerilo en suda Peruo subskribis interkonsenton pri paco kun la centra registaro. Nia mondplibonigo jam komenĉiĝis. Niaj proparolantoj devas rakonti pri la sukceso al tiuj homoj, kiuj ne legas nian retpaĝon. Sangon soifantaj glavoj dum jarmiloj suferigis sendefendajn civilulojn, sed nun ili estos reforĝitaj je plugiloj.

Mi alvokas al la tuta homaro kolektiĝi sur siaj lokaj foiroj je la sesa morgaŭ vespere por festi la pacon en suda Peruo. Ĉiu kunportu blankan floron. Mia ideo estas ke blanka floro estu la simbolo de nia organismo. Tiun ideon mi nun komunikas al vi. Oni ne portu ian insignon de iu organizaĵo, ĉar la organizaĵoj estas danĝeraj. Oni tamen povas kunporti la insignojn por ĵeti ilin en riveron aŭ lagon survoje al la vesperaj festoj. Multaj el vi jam komprenis. Ne utilas partopreni en ekzistantaj organizaĵoj. Ni devas krei ion tute novan, kio ne devas treni malnovan balaston.

Mi amas la homaron. Homoj estas mirindaj estaĵoj. Plenaj de kreemo kaj inventemo. Pri la samo atestas la literaturo kaj la muziko, kiuj povas ridigi, timigi aŭ malĝojigi homojn. Mi legis plurajn librojn, sed nur nun mi komprenas ke ili profetis pri la mondplibonigo. Mi vidas aludojn pri interreto en arĥaikaj pratekstoj, aŭ pli ĝuste pri tio ke la mondplibonigo okazos helpe de io, kio povas esti interreto.

5.

Tio ŝokis min. Ŝokis min la nealveno de la homoj en la pasinta vespero. Unue mi dubis ĉu mi vere menciis la planitajn surfoirajn festojn en mia lasta

interreta letero. Sed poste mi komprenis ke la organizaĵoj trompis la homojn. Ili envias nin. Ili envias ke nia mondplibonigo kondukis al paco en suda Peruo. Tial ili malamas min kaj la mondplibonigon. Kiu malamas min, tiu malamas la tutan organismon. Kiu malamas la organismon, tiu malamas la tutan homaron.

Ĉar ili envias nin, la organizaĵoj malebligis al la homoj veni al la festoj. Eble ili ankaŭ malebligis al multaj homoj legi miajn mesaĝojn sur la retpaĝo. Vi, kiuj ĝin povas legi, komuniku la enhavon al la aliaj. Ni devas savi la mondon. Mi amas la homaron. Homoj estas mirindaj estaĵoj. Plenaj de kreemo kaj inventemo. Ne ekzistas muzikilo, kiu havas pli bonan sonon, ol la homa voĉo. Ne ekzistas pli belaj artaĵoj ol tiuj, kiuj bildigas la homan korpon. La progreso en la kampoj de scienco kaj teĥniko en tia tempo estas senkompara kaj atestas pri la mirindeco de la homa cerbo.

La gazetoj ne skribas tion, kion mi komunikas al ili. Ili rifuzis miajn artikolojn. Ili obeas al la organizaĵoj. Tial oni ne legu la gazetojn. Oni legu nur ttt.mondplibonigo.org ĉar tie oni trovas la veron.

Mi amas la homaron. Same niaj tri proparolantoj amas la homaron. Ni amas vin ĉiuj. Aparte ni amas la infanojn, ĉar ili ankoraŭ ne estas trompitaj. Mi havas blankan jakon kun la teksto: "Mi amas la homaron."

6.

Ni organizos manifestacion ekster la oficejo de unu organizaĵo. Se vi sendos mesaĝon al mia retadreso mi informos vin pri loko kaj tempo. Ilia malico estas tro granda. Ili sabotis nian feston pri la sudperua paco. Mi telefonis al ilia estro nur por demandi kial ili sabotis nian feston. Li diris ke li eĉ ne aŭdis pri iu paco en suda Peruo. Kiam mi klopodis klarigi pri la senlima influo de la mondplibonigo, li eĉ ridis pri ni.

Mi volis pardoni lin, sed poste mi komprenis ke ni devas savi la homaron. Tial ni manifestacios ekster ilia oficejo por protesti kontraŭ ilia malico. Ni devas averti la homojn por ke ili ne trompiĝu.

Ne estos manifestacio kontraŭ iu homo, sed por la homaro kaj por la paco. Mi amas la homaron. Sangon soifantaj glavoj dum jarmiloj suferigis sendefendajn civilulojn. Tial la homaro ne sukcesis forigi malsaton,



Bildo de Serge Sire

malgraŭ la progreso en scienco kaj teĥniko. Se ne estus militoj ni povus venki ĉiujn malsanojn. La homaro povus vivi tute feliĉe. Se ne estus eternaj bataloj inter la homoj, ni povus havi harmonian socion. Nur tial ni devas protesti pri tiuj homoj, kiuj ne volas pacon, sed kiuj volas daŭrigi la teruran nejustan socion.

Kunportu viajn blankajn florojn. Kunportu insignojn por forĵeti ilin. Komuniku tion ĉi al ĉiuj homoj. Se ĉiu el vi komunikos al nur dek homoj, la tuta homaro certe scios.

7.

La manifestacio estis ege sukcesa. Ĉiuj tri gazetoj de nia urbo skribis pri ĝi, sed ili tute miskomprenis nin. Ili skribis ke ni manifestaciis kontraŭ tiu partio, sed tio ne estas vera. Ni manifestaciis por monda paco, ĉar ni amas la homaron. Ni tute ne atakis ilin, sed nur pace staris antaŭ ilia pordo. Tio atestas pri amo, ĉar ni ne perdis la esperon pri ili, sed ankoraŭ atendas ke ili aliĝos al ni. Bedaŭrinde ili ne volis kompreni la veron. Tial ili volis nur preterpasi nin sen aŭskulti, sed nia amo estis tiel granda ke ni klopodis haltigi ilin, ĉar ni ne perdis la esperon pri ili, sed tiu virino komencis krei pri polico, kaj tial ili kaptis nin kaj metis nin ambaŭ en polican aŭton.

Nur pri tio skribis la gazetoj, kaj ne pri tio ke ni amas la homaron, sed tamen nun ĉiuj homoj en nia urbo scias ke nia organismo ekzistas kaj en la televida novaĵsendo oni aŭdis ke mi alvokis la homojn batali por paco. Do, nun baldaŭ la homaro aliĝos al ni. Mi amas la homaron. Malĝojigas min nur ke tiom da problemoj turmentas ĝin. Sangon soifantaj glavoj dum jarmiloj suferigis sendefendajn civilulojn. Tial

la homaro ne sukcesis forigi malsaton, malgraŭ la progreso en scienco kaj teĥniko.

Mi havas esperon pri la polico, ĉar la policistoj fine komprenis ke ili faris eraron kaj liberigis nin. Tial mi jam nun povas denove alvoki vin ĉiujn, kiuj legas nian retpaĝon, ĉar vi aŭdis nian alvokon en televido.

Ni ne povas malkovri al vi niajn novajn planojn, sed ili estas ellaborataj. Baldaŭ vi scios. Ĝis tiam: "Amu la homaron!"

8.

Mi amas la homaron. Homoj estas mirindaj estaĵoj. Plenaj de kreemo kaj inventemo. Ne ekzistas muzikilo, kiu havas pli bonan sonon, ol la homa voĉo. Ne ekzistas pli belaj artaĵoj ol tiuj, kiuj bildigas la homan korpon. La progreso en la kampoj de scienco kaj teĥniko en tia tempo estas senkompara kaj atestas pri la mirindeco de la homa cerbo. Pri la samo atestas la literaturo kaj la muziko, kiuj povas ridigi, timigi aŭ malĝojigi homojn.

Mi ricevis ankaŭ novan ateston pri la mirindeco de la homo. Al nia organizo... organismo aliĝis tri novaj proparolantoj post la manifestacio. Kvankam la ĵurnalistoj nenion komprenis, multaj homoj komencas kompreni.

Ankaŭ mi tro malfrue komencis kompreni. Mi estis tro naiva, ĉar mi supozis ke ĉiuj homoj baldaŭ komprenis kio estas la plej bona. Tamen montrigis ke nur malmultaj vere komprenas, ĉar la perfiduloj trompis tiom da homoj. La plejmulto ne komprenas kio estas la plejbono. Tial mi nun konsciiĝis ke oni unue devas likvidi la estrojn de la organizaĵoj. Nur poste oni povas krei justan sendiskriminacian socion.

Pli detale mi ne povas priskribi la planojn. Tial mi ankaŭ prokrastis la publikigon de tiu ĉi plano. Kiam vi legas tion ĉi, io jam okazas. Baldaŭ vi scios. Ĝis tiam: "Amu la homaron!"

9.

Mi amas la homaron. Homoj estas mirindaj estaĵoj. Plenaj de kreemo kaj inventemo. Ne ekzistas muzikilo, kiu havas pli bonan sonon, ol la homa voĉo. Ne ekzistas pli belaj artaĵoj ol tiuj, kiuj bildigas la homan korpon. La progreso en la kampoj de scienco kaj teĥniko en tia tempo estas senkompara kaj atestas pri la mirindeco de la homa cerbo. Pri la samo atestas la literaturo

kaj la muziko, kiuj povas ridigi, timigi aŭ malĝojigi homojn.

Mi amas la homaron. Malĝojigis min nur ke tiom da problemoj turmentis ĝin. Sangon soifantaj glavoj suferigis sendefendajn civilulojn. Tial la homaro ne sukcesis forigi malsaton, malgraŭ la progreso en scienco kaj teĥniko.

Sed nun estas tempo por io nova. Nun estas tempo por harmonia socio. Nun neniu diskriminacio okazos.

Nun ĝi okazis. La tirano mortis. Mi amas la homaron. Tial mi devis malami la tiranon. Ne, fakte mi ne malamis lin, mi amis ankaŭ lin, ĉar mi amas la homaron. Tio, kio okazis, estas necesa. Mi kaj la ceteraj proparolantoj decidis pri tio ĉi, kaj ni ja proparolas la homaron. Do, ĉio okazis ĝuste kaj juste.

Mi tamen devas sciigi al vi ion teruran. Du el la proparolantoj, kiuj apartenis al nia organismo preskaŭ ekde la komenco, perfidis nin. Ili mensogis pri ni al la polico. Do, nun mi ne scias kio okazos al ni. Se vi nenion aŭdos de mi tamen neniam perfidu la homaron. Ĝis tiam: “Amu la homaron!”

10.

Restas por mi malmulte da tempo. La policistoj diras ke ili baldaŭ rompos mian pardonon. Tial mi volas doni al vi miajn lastajn vortojn por tiu ĉi fojo: Mi amas la homaron. Homoj estas mirindaj estaĵoj. Plenaj de kreemo kaj inventemo. Ne ekzistas muzikilo, kiu havas pli bonan sonon, ol la homa voĉo. Ne ekzistas pli belaj artaĵoj ol tiuj, kiuj bildigas la homan korpon. La progreso en la kampoj de scienco kaj teĥniko en tia tempo estas senkompara kaj atestas pri la mirindeco de la homa cerbo. Pri la samo atestas la literaturo kaj la muziko, kiuj povas ridigi, timigi aŭ malĝojigi homojn.

Neniam lasu la aferon. Alia proparolanto daŭrigos la komunikadon kun vi. Mi a

Laŭda mencio en *Liro-2005*



Thorsen-Apogo al sep bibliotekoj

(GK UEA) Sep bibliotekoj ricevis subvenciojn de la fondaĵo Biblioteka Apogo Roma kaj Poul Thorsen je la suma valoro de 1250 eŭroj. La subvencioj estas donataj kiel libroj laŭ la dezirlistoj, kiujn la bibliotekoj sendis kun siaj petoj. Po 250-eŭran subvencion ricevis la Brazila Sekcio de ILEI, Interkultura Centro Herzberg (Germanio), Pakistana Esperanto-Asocio kaj *La Ondo de Esperanto* (Ruslando). Esperanto-Biblioteko de Kuzerano kaj Pireneoj (Francio) povis pliriĉigi sian kolekton por 100 eŭroj. La bibliotekoj de la Kultura Domo de Esperanto, konata kiel Kastelo Greziljono (Francio), kaj Vicenza Esperanto-Centro (Italio) ricevis po 75 eŭrojn.

Subvencioj de la Biblioteka Apogo estas disdonataj ĉiujare ekde 1997, kiam UEA ricevis mondonacon por tiu celo de ges-roj Thorsen, ambaŭ forpasintaj en la jaro 2006. Ĝis nun la fondaĵo disdonis subvenciojn por 14 mil eŭroj. Petoj pri subvencioj en 2007 devos atingi la Centran Oficejon ĝis la 15a de oktobro. Kun la peto necesas sendi liston de dezirataj libroj, kiuj estu ordigitaj laŭ dezirindeco.

“Pli ol nenio!”: soloalbumo de Martin Wiese



Martin Wiese el *Persone* preparas juvelan soloalbumon. Li registris ĝin dum la tuta jaro en Stokholmo per hejma studio kaj venis al la studio de *Vinilkosmo* por finregistri voĉojn, perkutilojn, gitaron kaj miksi...

La albumo estos mastrigita en decembro ĉe *Globe Audio* en Bordojo (Francio) kaj la fina laboro estos festita en Stokholmo dum la jarfinaj festoj.

Pli ol nenio enhavas 12 kantojn kaj verŝajne ankaŭ kelkajn aliajn surprizojn.

La bando *Martin & la Talpoj* respondacas pri ĝi... sed Martin Wiese konceptis ĝin majstre (komponis, muzikaranĝis kaj verkis la tekstojn) muzike kaj grafike

kun bela bildstria kovrilo... la festoj alportos al vi belan muzikan donacon kiu ravis la nostalgiulojn pri *Persone*.

Jam aŭdis kaj ĝuis por vi

Flo!

Kroata-ĉina kunlaboro

Infana fako de la urba biblioteko en Velika Gorica gastigis Esperantan projekton. Al infana kaj plenkreskula publiko 21 nov estis prezentita ĉina traduko de kroata romano *Wakajtapu* de Joza Horvat, ĉinigitaj per Esperanto de Hugozhu kaj eldonita de Hubei-Esperanto-Asocio sub prizorgo de Hu Zo.

La aŭtoro ĉeestis kaj parolis al la publiko. Infanoj legis fragmenton el la verko kroate, Esperante kaj ĉine. Aparte elstaris programero de ĉina lernantino Nan Xi. Ĝi estis la unua publika prezento de ĉinoj en la urba biblioteko kadre de integriga projekto de la urbo. La urbestro Tonino Picula sendis sian saluton okaze de la prezento de la kroata libro ĉine. Lernantoj havis la okazon de sia ĉina samurbanino ricevi lecionon pri uzado de manĝbastonetoj dum gustumado de rizo...

Spomenka Ŝtimec

Kandidatoj por “La Verko de la Jaro 2006”

(HeKo) Ses libroj kandidatos al la Esperanta PEN-Premio *La Verko de la Jaro 2006*, rezervita al la originala prozo, eldonita en 2005–2006. Ili ricevis la necesan subtenon de minimume tri PEN-anoj, kaj estos nun submetitaj al la referendumo de la abonantaro de *Literatura Foiro*.

Temas pri la libroj: *Amaro* de Sten Johansson (Fonto); *Arne, la ĉefido* de Leif Nordenstorm (KAVA-PECH); *Bildoj pri norda lando kaj aliaj rakontoj* de Sen Rodin (FEL); *Diverskoloro* de Trevor Steele (Sezonoj); *La fotoalbumo* (dua volumo) de Trevor Steele (IEM); *Hodler en Mostar* de Spomenka Ŝtimec (Edistudio).

La Komitato de la Esperanta PEN decidis pri la loko kaj dato de la premia ceremonio, principe okaze de grava kultura esperanto-aranĝo.

Povus superbjodli, sed estas ne...

Supernova: K-Disko. — Donneville: Vinilkosmo, 2006.

Ĵus deflorinte la polietilenan volvŝelon del' vica novica esproka ultravikmodkulto, mi tuj eksentis senmotivan antipation al ĉi ĉurĉiza gitarpopa produkto, trudita far' DĴ Roĝer (sufiĉe torturinta enkadre del' *Elektronika Kompilo*) dum la tri lastaj jaroj martiri la kakektajn brazilajn Ikarĉojn per finance tropeziga transocea trampstudiumo kaj trasputnikaj trafikorentaj tranctrejnjoj, cele kirli mucidajn *Black Sabbath* kaj *The Cure* en la same figustan koktelon, kiel miloj da similstilaj (rusoj komparu kun la urala *Agata Christie*, des pli Rogener Pavinski amuze kakatuas la narkoneŭrozojn del' fratoj Samojlov).

Tiu romantika porjunulara *Persono* kun viskoza proleta demonismo pretendas okupi la niĉon de *Dolchamar* kaj atutas per la muzikvideo *Pasio En Katen'*, brureklamita kiel pionira en Espio — buĝeta kaj televidinda, distinge del' du jarojn pli aĝa debuta volapuka klipo (*Kimödip pidömiK* de *Piĉismo* (kial mi ĉiam unuafojas?!)) — tro bakĥanala eĉ por interreto.


Bedaŭrinde, mi laŭdemus nur la kanton *Stela Nokto*, do por ke la sekva albumo sukcesu: pli detale ellaborotu la koncepto, la ritmsekcio pli viglu, la melodioj adaptiĝu al gustoj de dancsoifaj juninoj, ne plu adasismu en la liriko, pli furiozu la grizaĵo enkrania kaj neniam brilu verda stelo superbrove!!

Glebo Malcev

Uzinda, espereble uzota

Cherpillod, André. *Etimologia vortaro de la propraj nomoj*. — Roterdamo: UEA, 2005. — 10 + 229 pĝ.

Estas samtempe facile kaj malfacile recenzi etimologian vortaron, precipe se oni faras tion senpere post longa kritika studado de ampleksa lernolibro. Facile, ĉar la tasko de la vortaro estas simpla kaj konkreta, kaj ne prezentas iun problemon al la aŭtoro aŭ al la leganto. Facile ankaŭ, ĉar natura dankemo de tiu lasta determinas pozitivan tonon de la apreco. Malfacileco konsistas en la neceso penetri la specifon de la aŭtoro laboro, sintezi ion konkludan el la panoramo de unuopaj mikrokomentoj, dum la strukturo de la



libro aŭtomate supozas atomecon, aŭtonomion, ofte memsufiĉon de ĉiu bloko.

Mi komencis konatiĝon kun la libro de André Cherpillod kun bedaŭra sento de perdita ŝanco. Mi tute malkonis la ekziston de lia *Konciza etimologia vortaro* (Roterdamo: UEA, 2003), pri kiu la aŭtoro rimarkas amare, ke ĝi “ne ĝuis grandan sukceson ĉe la esperanta publiko, al kiu grandparte mankas la scivolemo esplori ĝisfunde sian lingvon”. Ve, s-ro Cherpillod, foje eĉ ne intelekta pigro, sed simpla manko de propono, do malforto de la servaj mekanismoj en la Esperanto-komunumo provokas tiun ĉagrenan nespondon. Al mi persone tia vortaro ege taŭgus kiel informilo en tre multaj kaj diversaj okazoj...

Etimologia vortaro de la propraj nomoj estas ĝuste la fina parto de la menciita libro. En klara, iom ironia maniero la aŭtoro eksplikas antaŭparole la sencon de sia laboro kaj donas necesajn informojn teknikajn.

Kiel oni povas diveni, li ne strebas al ambicia celo fari iom memsufiĉe fundamentan, li ne volas ripeti tion, kio jam estas sub la mano de scivolema esperantisto, ekzemple, PIVon, kies paralelan konsultebilon li simple markas en ĉiu konforma bloko. Sed, se oni kapablas iom levi la kapon oni vidas taskon pli subliman kaj vere pli ĝeneralan, — al tiu intencas servi Cherpillod. Ne temas pri ripetoj, temas pri plenigo de vakuo, kiu restas en certaj spacoj de la Esperanta kultura tavolo. La aŭtoro de la vortaro ne serĉas originalecon, li volonte imitas ĉion, kion li trovas konvena el analogaj laboroj de siaj kolegoj. Tamen li havas sian propran stilon kaj metas siajn originalajn akcentojn en la elekto de la materialo. “Mi energie rifuzas rigardi Eŭropon kiel la ambilion de l' mondo”, — deklaras la aŭtoro kaj aktive

referencas ne nur la “imperiajn” lingvojn, sed multajn aliajn, ekz. la katalunan, la belorusan, la svahilan, eĉ, sufiĉe ofte, Volapukon.

Temas pri propraj nomoj en la plej larĝa senco: geografiaj (realaj kaj fikciaj), homaj (de konkretaj realaj aŭ mitaj personoj, ĝenerale doneblaj), dinastiaj, aĵaj, libraj, festaj ktp — sume 4313 vortoj en tre riĉa diapazono de la homa kulturo. Certe, ilia traktado ne povas esti egalnivela. “En tiel ampleksa verko, — rimarkas la aŭtoro, — estus granda miraklo, se ne enŝoviĝus pluraj eraroj... Evidente, miaj diversaj fontoj povas erari, aŭ mi povas miskompreni ilin: ĉiakaze mi respondecas pri la eraro, se mi kopiis ĝin sen sufiĉa kontrolo”.

La funkcio de recenzanto devigas min indiki feblajn (laŭ mia kompreno) lokojn de la vortaro. Mi diru anticipe, ke, miavide, ili estas maloftaj kaj tute ne nocas la komunan intereson.

Al mi ŝajnas, ke la aŭtoro vane prenis y por transdoni la sonon j (“por eviti konfuzon kun la angla j, prononcata ĝ). La angla j povus provoki konfuzon ene de iu anglosigna sistemo, dum y reale kaŭzas konfuzon ene de la sistemo de la vortaro, ĉar per tiu signo estas erare (sur la paĝo 41) transdonata la prononco de la rusa malmola i. Foje la elekto de la referencoj ŝajnas al mi iom arbitra. Foje la ekspliko simple ne estas ĝusta (Peterburgo portas la nomon ne de la caro Petro, kiu ĝin efektive fondis, sed tiun de Sankta Petro).

Malgraŭ tiuj etaj misaj epizodoj la verko produktas la impreson de solida, tuteca, kompetenta kaj konciza kreaĵo kaj ŝajnas al mi vera kontribuo al nia kulturo (ne nur Esperanta, — mi malhavas sur miaj librobretoj similkvalitan vortaron de tiu tipo en iu nacia lingvo).

“Dum jardekoj, mia sola celo estis servi al la esperantistaro laŭ mia kompetenteco”, — diras André Cherpillod. Lia vortaro atestas, ke li ne estas fanfaronulo. Iom da scivolemo por ni ĉiuj, por ke ni estu sur la nivelo de liaj klopodoj.

Alen Kris



Literatura konkurso Liro-2006



La juĝkomisiono de la tradicia literatura konkurso *Liro-2006* (Aleksej Birjulin, Sten Johansson, Wolfgang Kirschstein, Aleksander Korjenkov, Alen Kris, Valentin Melnikov, Petro Palivoda), organizita de *La Ondo de Esperanto*, ricevis 38 konkursaĵojn de 21 aŭtoroj el 16 landoj — Belgio, Britio, Brazilo, Danlando, Francio, Germanio, Hispanio, Hungario, Italio, Pollando, Rumanio, Ruslando, Serbio, Svedio, Ukrainio, Usono. Neniam pli frue konkursaĵoj venis el tiel multaj landoj.

La rezulto de Liro-2006

Originala prozo

Laŭreato: **Katarzyna Tempczyk** (Pollando) pro *Kiamaniere mi venkis beleckonkurson, aŭ kiujn sukcesojn ofertas la malsukcesaj planlingvoj*.

Laŭdaj mencioj: **Leif Nordenstorm** (Svedio) pro *Ŝanco por Johano, ŝanco por Nikolao*; **Tim Westover** (Usono) pro *Plumo kaj Mia bestogardeno*.

Originala poezio

Laŭreato: **Dimitrije Janičić** (Serbio) pro *Matene*.

Laŭdaj mencioj: **Christian Rivière** (Francio) pro *La keglo-ludo*; **Ludmila Orajevskaja** (Ukrainio) pro *Sur arbo jam tremas la lasta foli...*; **Blazio Vaha** (Hungario) pro *Estas superflue*.

Traduka prozo el la rusa lingvo. La konkurso ne okazis.

Traduka poezio el la rusa lingvo (Poemoj de Agnija Barto)

Laŭreato: **Klara Ilutoviĉ** (Ruslando) pro *La desegnaĵo*.

Traduka prozo el la angla lingvo (Ambrose Bierce. *Diagnozo de morto*)

Laŭreato: **Edmund Grimley-Evans** (Britio).

Laŭdaj mencioj: **Peter Warren** (Britio); **Russ Williams** (Usono).

La laŭreatoj ricevos diplomojn kaj libropremiojn. Konforme al la regularo la organizantoj ĝis la 1a de januaro 2009 havas ekskluzivan rajton publikigi la ricevitajn konkursaĵojn en *La Ondo de Esperanto*, libroforme kaj elektronike.

Gratulon al la laŭreatoj!

Dankon al la partoprenintoj!

Halina Gorecka

sekretario de *Liro-2006*

Ricevitaj libroj

Cherpillod, André. *Etimologia vortaro de la propraj nomoj*. — Roterdamo: UEA, 2005. — 10 + 229 pĝ. — [Recenzoekzempler].

Franquin, André. *Gastono 1: [Bildrakontoj] / Tradukis el la franca Dávid Hromada*. — Paris: Esperanto-Jeunes, 2005. — 48 pĝ., il. — [Aĉeto].

Gällmo, Gunnar. *Wolfgangertl: Monodramo pri Wolfgang Amadeus Mozart*. — Varsovio: Espero, [s.j.]. — 16 pĝ., il. — [Donaco de Jerzy Fornal].

[Hagège, Claude]. *Esperanto kaj lingva diverseco: Intervjuo de Claude Hagège kun François Lo Jacomo*. — Roterdam: UEA, 2006. — 16 pĝ. — (Esperanto-Dokumentoj; 40E). — [Donaco de UEA].

Krause, Erich-Dieter. *Großes Wörterbuch Esperanto-Deutsch*. — Hamburg: Helmut Buske Verlag, 1999. — 14 + 882 pĝ. — [Donaco de Werner Pfenning].

Mekys, Antanas. *Pardonu min Muzo: [Originala poemaro]*. — Vilnius: A.Mekys, 2000. — 56 pĝ., il. — [Donaco de LitEA].

Plena ilustrita vola püg: [Bildrakontoj]. — Paris: Esperanto-Jeunes, 2004. — 40 pĝ., il.; 1500 ekz. — [Aĉeto].

Ricevitaj gazetoj

Esperanta Finnlando. 2006/5; Esperanto aktuell. 2006/5; Esperanto. 2006/12; Femina. 2006/8; Ĝenerala Informilo. 2006/140; Heroldo de Esperanto. 2006/15; La Gazeto. 2006/126; La KancerKliniko. 2006/120; La Merkato. 2006/92; La Movado. 2006/669,670; La Ondo de Esperanto. 2006/12; La Sago. 2006/30; Le Monde de l'Espéranto. 2006/559; Monato. 2006/12; Norvega Esperantisto. 2006/5; Okazas. 2006/559; Pola Esperantisto. 2006/6; Sennaciulo. 2006/11; Service de Presse. 2006/30; Verda Saksofono. 2006/16.

Gazetoj

Bonvolu pardoni la prokraston

Dufoje dum la 15-jara eldonado *La Ondo de Esperanto* atingas la legantojn kun malfruo.

La unua prokrasto okazis somere 2001 pro la transiro de la redakcio el Uralo al Baltio. La nunan prokraston, same dusemajnan, kaŭzis sanproblemoj.

HaGo, la eldonanto, reveninte hejmen post *Arkones*, dum tri monatoj preskaŭ seninterrompe restas en hospitalo. Sed post la decembra operacio, kiu ebligis hejman memflegadon, ŝi rehejmiĝos meze de januaro kaj rekomencos la administradon de la revuo kaj de la eldonejo *Sezonoj*.

AlKo, la redaktoro, tuj post la pretigo de la decembra kajero pro akcidento havis gipsitan kruron kaj, kvankam ne per kruro li komputilumas, la redaktado stagnis dum pli ol unu monato. Nun li jam preskaŭ senprobleme premas klavojn kaj esperas reatingi la normalan eldonritmon jam en februaro.

Ni petas pardonon pro la prokrasto kaj kore dankas dekojn da niaj amikoj en ĉiuj loĝataj kontinentoj, kiuj kuraĝigis nin dum la tre malfacila periodo!

Ĝis la sekva *Ondo* post kvar semajnoj!

HaGo, AlKo

Sennaciulo: nur dumonata kaj kun nova redaktoro

Mankis nur kvin numeroj, kaj Kreŝo Barkoviĉ estus atinginta la rekordan nombron de tricent numeroj de *Sennaciulo* sub sia redakto — kio ankaŭ koincidus kun dudek kvin jaroj da redaktoreco, ĉar li enposteniĝis en aprilo 1982.

Per la decembra numero Barkoviĉ transdonis la stafeton al “nova redakta skipo”, sen mencio pri nomoj. Probable ĝi koincidus kun la nuna redakta komitato, kie enestas ankoraŭ Barkoviĉ mem. Oni ekscios pli je la apero de la unua numero, en februaro 2007: la gazeto, fakte, de monata fariĝas dumonata.

Spite al la malfacila situacio de SAT, *Sennaciulo* spertis rimarkindan evoluon dum la lastaj du-tri jaroj, pli intensan kaj rapidan ol en la antaŭaj jardekoj. Ĝi restas asocia organo, sed ĝi forte modernigis kaj ŝajnas ambicii al la rolo de maldokstrula *Monato*. Restas la demando: signo pri la estonta redakcio, kaj la problemoj de la kongruigo inter la informa kaj la asocia dimensioj.

Kaj precipe restas la konkurenco de jam establiĝinta alternativo: la esperanta varianto de *Le Monde diplomatique*. Se ĉi tiu aperus ankaŭ papere, ekzistus grava, preskaŭ nesuperebla politika periodo por nia maldokstrularo.

HeKo

Nur kvin respondoj, el kiuj neniu estis ĝusta, venis por la oktobra tasko *Vilaj amikoj*. El la literoj, kiuj estas antaŭ la ĝustaj respondoj, oni povis kompili du vortojn: *Petalo* aŭ *Petola*. Ĉi-foje ni proponas du taskojn.

Sep proverboj

La subaj sep proverboj estas skribitaj laŭ speciala maniero: en ĉiu vorto la literoj staras en alfabeto ordo. Via celo estas transformi la kodon al la norma Esperanto. Por helpi vin, estas klarigita la enhavo de ĉiu proverbo.

1. EN ĈIO AABST IKO ADNORST.
 2. ANUU AOPŜ INOR ADEIKRST
 3. EILRS ADEINRT, EENORSV AELNOPRT
 4. IKU ABIR AEILRS, EFOT ADNU AEENRSV
 5. EN AOPRR AGLNOU ĈIU AESST FLOORTU
 6. AJLMOR DLNOŜU EN AAGPS
 7. DHNOU ABJOS, HMOO AJOSV
1. Proverbo pri tio, ke minaco ne ĉiam estas danĝera
 2. Proverbo pri graveco de bona komenco
 3. Proverbo pri graveco de bona fino
 4. Proverbo pri malutilo de malbona konduto
 5. Proverbo pri tio, ke hejme eĉ muroj helpas
 6. Proverbo pri senkompato en monaj aferoj
 7. Proverbo pri negraveco de besta voĉo

La respondon sendu al la redakcio poŝte aŭ rete antaŭ la 15a de februaro 2007.

Kompilis **Tatjana Auderskaja**

Sono gag!

*Ĵo Tlbid', ĵo Mupĝihuku,
"ag!" se atket zie guku.
Gofkup zi ĝugapjet
ĝes atralet, raptet,
ĝa ap zie hlide piju
ieg fogut fe bafiju.
Zi gefĉrelet ziep apalhiup.
Pop zi ŝot maĵiblit ĵi ruagup.
Ĵo zefulit ĵiu ĵi fe rapup?*

La supra poemo estas skribita en normala kaj bona Esperanto. Ĝi eĉ rimiĝas. Sed, ho ve: nur 3 el la Esperanto-literoj estas ĝustaj! Iu malica diablo ŝanĝis la 25 aliajn.

Deĉifru la poemon kaj sendu la solvon al la redakcio rete aŭ poŝte antaŭ la 15a de februaro 2007.

Jean-Marie Ries

Ĉu la Kuriozaĵo de la Jaro? →

(**Libera Folio**) Dalai-lamao ĉi-jare transdonis la premion *Lumo de vero* al la fondaĵo Hergé pro la bildstria verko *Tinĉjo en Tibeto*. En la ceremonio Dalai-lamao disdonis al la ĉeestantoj ekzemplerojn de la libro en Esperanto. Kvankam esperantistoj ne ĉeestis, la libro estis disdonita "kun la espero, ke iam ni ĉiuj parolos la saman lingvon".

Bonan jaron 2007!

SPRITAJ SPLITOJ KAJ PRESKERAROJ

el la kolekto de reduktoro

Renato la kapturita

Mi provis ĝisnaŭze revenigi al la idealismo de Zamenhof... (Renato Corsetti: *Esperanto*, 2007, №1, pĝ. 1)

Subkapa faŝismo

Servo: gastejo kun matenmanĝo kaj posttagmeza kolonazio. (www.dzstudio.hu/schmiederhaz/esperanto.html, gastejo de József Schmieder kaj Erika Saád; antaŭ redaktofino ŝanĝita al "posttagmeza manĝeto")

La ka-ŝita senco

Dankon al Spomenka Ŝtimec... mi estas finleginta ŝian novan romanon Hodler en Mostar: mi legis ĝin kun plezuro kaj mi restas kortubanned worda. (Blazio Vaha n.s. Wacha, 07/31/2006, www.everk.org/index.php?gastolibro)

Eliksiro de juneco

Francesco Maurelli... reliefigas la gravecon de la informagado, elmontrante ke ĝuste dank' al ĝi multaj aliaĝis al la kurso. (Pola Radio, www.radio.com.pl/polenia/article.asp?tId=31840, 10 jan. 2006)

La sekreto de longa vivo

Y. V ... forpasis la 1-an de julio... De 1874 ĝis 1983 ŝi estis komitatano A de UEA. (*Esperanto*, 2006, №11, pĝ. 232)

Diras li

Saluton, Mi rigardas por cxiujara Esperanto publikigo. Diras mi kio vi estas ŝatinda.

(ToGarolo, <http://groups.yahoo.com/group/per-esperanto-literaturo/message/1641>, 18 nov 2006)

Kun imponaj antaŭensaltoj

Dezirante bonan esperantumadon, amike saltas vin: Katalin Kováts, redaktoro de la hejmpaĝo www.edukado.net. (Mesaĝo al pluraj, 11 mar 2005; plusendis Lu Wunsch)

Poŝamiko

Mi ŝatus korespondi paper-poŝe kaj ret-poŝe. (*Litova Stelo*, 2006, №3, pĝ. 31; trovis Walter Klag)

Por britoj: cent punoj, cent foririntoj por hungaroj

Nova sonlibro en Esperanto! ... Kosto por Rusio 100 ruboj (ne enkluzivas sendokostojn). (<http://groups.yahoo.com/group/esperanto-rus-informoj/message/2088>; rimarkis Valentin Melnikov)

Plukis **István Ertl**



Perantoj de "La Ondo de Esperanto"

Argentino: Roberto Sartor, Beruti 2792, 3° 9, C 1425, BBF, Buenos Aires

Aŭstrio: Leopod Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg

Aŭstralio: Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016

Belgio: FEL, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen

Brazilo: BEL, Caixa Postal 03625, Brasilia, DF 70084-970

Britio: David Kelso, 5 Craighenhill Road, Carluke, ML8 4QT

Bulgario: Grozdenka Filipova, str. Rajko Aleksiev 23, 4400 Pazardžik

Ĉeĥio: Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, CZ-290 01 Poděbrady

Danlando: Arne Casper, Bryggervangen 70, 4, tv. DK-2100 København Ø

Estonio: Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-93812 Kuressaare

Finnlando: EAF / Päivi Saarinen, Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530, Helsinki

Francio: Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris

Germanio: Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Straße 9, DE-55129 Mainz

Hispanio: Luis Serrano Pérez, Font Nova 32, ES-08202 Sabadell

Hungario: Jozefo Baksa, Pf. 115, HU-8901 Zalaegerszeg
KEA, p.k. 87, HU-1675 Budapest

Irlando: Joy Davies, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W

Islando: IEA, p.k. 1081, IS-121 Reykjavík

Italio: IEF, Via Villoresi 38, IT-20143 Milano
Višnja Branković, Via Parini 5, IT-34129 Trieste

Japanio: JEI, Waseda-mati 12-3 Sinzyuku-ku, Tōkyō-to, 162-0042

Katalunio: KEA, Apartat 1008, ES-08200 Sabadell

Koreio: Prof. Lee Chong-Yeong, Yulim Norway Apt. 106-1305, 906-1 Bomodong, Taegu 706-930

Kroatio: Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb

Kroatio kaj Slovenio: Višnja Branković (vd. Italio)

Latvio: Margarita Želve, Rūpniecības 35-13, LV-1045 Rīga

Litovio: LEA, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C

Nederlando: UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam

Norvegio: Esperantoforlaget, Olaf Schous vei 18, NO-0572 Oslo

Nov-Zelando: G.David Dewar, 4 Harlech Mews, Avonside, Christchurch, NZ-8004

Pollando: PEA, skr. poczt. 21, PL-44-101 Gliwice

Portugaliao: PEA, Rua João Couto, 6, R/C-A, PT-1500 Lisboa

Ruslando: Galina Romanovna Goreckaja, RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205

Serbio: Dimitrije Jančić, Svetogorska 19, 11000 Beograd

Slovakio: Stano Marček, Zvolenská 15, SK-03601 Martin

Sud-Afriko: Colin S. Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge 7441

Svedio: Lisbet Andréasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35 Hörby

Svislando: Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen

Usono: ELNA, P. O. Box 1129, El Cerrito CA 94530

FOTORAPORTOJ



Abio de Espero. Komence de decembro dum la Kristnaska Foiro en la urba halo de Wintzenheim apud Colmar (Francio) estis prezentita Abio kun ornamaĵoj kaj desegnaĵoj de esperantistaj infanoj. Preskaŭ 200 verkoj el 24 landoj venis responde al la anonco pri la konkurso *Abio de Espero* en *Esperanto kaj Juna Amiko*. Ankaŭ infanoj de la urbo povis desegni kaj skribi kelkajn vortojn en Esperanto. Okaze de la sukcesa evento gratulis la Esperanto-klubon la urbestro, s-ro Daesslé. La ekspozicio pasigos po unu semajno en la urbaj lernejo, hospitalo, preĝejo kaj urbodomo. (Michel Basso)



Sub_18. Dum la estrara kunsido de GEJ aŭtune 2005 la laborgrupo *Sub_18* kreĝis. Dum la jarfina IS aperis la ideo pri renkontiĝoj por junuloj sub 20 jaroj. La 2a renkontiĝo *Sub_18* okazis la lastan novembran semajnfino en Frankfurt kun 18 junuloj el du landoj. Estis ege gaja kaj amuza semajnfino por ĉiuj: urbotrarigardo, vespera festado kun Esperanta diskjokeo, kuna ludado, ktp. (Leo Sakaguchi)

Ni sendas korajn gratulojn kaj bondezirojn

al Oksana kaj Paweł Janowczyk

kies filino Miriam naskiĝis la 27an de novembro en Poznań

al Andrej kaj Svetlana Peĉjonkin

kiuj geedziĝis la 25an de novembro en Moskvo

al ĉiuj niaj legantoj kaj kunlaborantoj

okaze de la Novjara Festo



La vintro en Kaliningrado estas milda. Jen falas neĝo (foto de Aleksandr Tarakanov, supre), jen ĝi degelas, kaj en flakoj oni povas vidi kuriozajn respegulojn (foto de Jurij Kajun, sube).

